


# KALEJDOSKOPA REMEMORO

*Alberto Fernández*



FEL

Kalejdoskopa rememoro

# Kalejdoskopa rememoro

Alberto Fernandez

# Kalejdoskopa rememoro

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

Tiu ĉi e-libro estas nekompleta provversio kaj rajtas esti kopiata .

# Enkonduko

La unuaj tekstoj kiujn mi verkis en Esperanto publikiĝis laŭ nekutima vojo: ili aperis dum plena semajno en flandralingva gazeto kie ili estis deĉifreblaj por dekmiloj da kutimaj legantoj kaj legeblaj por kelkcento da esperantistoj. Tio ja okazis dum la SAT-kongreso en mia loĝurbo Gent, en 1961. La flandra socialista gazeto *Vooruit* [Antaŭen] disponigis kvaronpaĝon por ĉiutaga raportado, en Esperanto, pri la kongreso. La loka kongresa komitato petis al mi tion prizorgi. En tumulta kongresa atmosfero mi estis samtempe redaktoro, ĵurnalisto kaj fotisto, vespere provleganto de la kompostaĵoj ... kaj la postan tagon eĉ disvendanto de la gazeto inter la kongresanoj. Raportoj, sciigoj, intervjuoj, programanoncoj kaj foje ironiaj komentoj aperis en '*La voĉo de la kongreso*'. Mia Esperanto-verkemo estis tie hardita.

Fiere mi eltondis tiujn unuajn presitajn tekstojn kaj gardis ilin en dokumentujo ... en mia kelo. Tie ili senglоре pereis kiam, dum somera pluvego, torenta akvofluso inundis la straton. '*La voĉo*' perdiĝis, restas nur rememoro.

Pri ĉio dum la sekvaj jardekoj verkita mi estis pli atenta kaj zorge gardis ekstran kopion en la plej alta ĉambro de mia loĝejo. Alvenis nun oportuna momento por elekti, ordigi, korekti, enkomputiligi kaj prezenti, en ĉi tiu *Kalejdoskopaj rememoroj*, tion, kio iom rezistas al la erodo de la tempofluro.

Mi limigas tiun elekton al tekstoj kiuj efektive estis publikigitaj, ĉu en revuoj, libroj aŭ interrete. Sciencaj temoj apartenas al miaj intelektaj preferoj sed engaĝinta ideologio same vigle tuŝas mian animon. Tio estas klare videbla en la selekto prezentita. Preskaŭ ĉiuj artikoloj kaj eseoj ĉi tie prezentitaj rezultas ne de iu spontana decido mia sed plejofte de ekstera invito, peto aŭ instigo tion fari. Mi tial opinias utile ĉi sekve iomete prilumi kiamaniere la tuto estiĝis.

\*\*\*

Je la komenco de la jaroj 1960 la verkoj de la jezuito-paleontologo Pierre

Teilhard de Chardin ĝuis konsiderindan atenton en vastaj rondoĵoj intelektulaj. Teilhard mortis en 1955 kaj dum sia vivo li ne rajtis publikigi siajn ideojn pro malpermeso de la Vatikano. Se tiu plej alta katolika instanco iun verkon cenzuras, tio signifas, ke temas pri io altvalora... Mi konatiĝis kun la ĉefaj verkoj de Teilhard kaj tuj fortege aprexis lian brilan defendon de la biologia evoluo-teorio kaj precipe ties etendigon al ĉiuj sociaj sciencoj. Teilhard ankaŭ tre forte emfazis la signifon de la homo ene de la biologia evoluo kaj faris kuraĝan (sed vanan...) klopodon por akordigi sciencon kaj religion. Tio estis mia mensa enhavo tiuepoka kiam artikolo de *Skeldido* min tuj incitis verki por *Sennacieca Revuo* mian artikolon **Aspektoj el la mondbildo de Teilhard de Chardin**. Kiam mi nun (post kvardek jaroj!) ĝin relegas, mi pli sobre kaj nuance opinias pri la scienc-filozofia idearo de Teilhard kvankam daŭre kun respekto por lia eksterordinara sintezo-kapablo.

En 1963 mi feris, kun mia edzino kaj tri junaj infanoj, en la Esperanto-kampadejo de Primošten, ĉe la Adriatika marbordo. Neforgesebla travivaĵo, unu el la plej belaj momentoj en mia memoro. La ĉefa iniciatinto de tiu Esperanto-kampadejo estis d-ro Gabriel Divjanoviĉ, direktoro de la astronomia observatorio en Zagreb. Tie li arigis grupon de junaj esperantistoj, amatoraj astronomoj, kaj kun ili li eldonis i.a. la popularsciencan trimonatan revuon *Homo kaj Kosmo*. Lun tagon mi diskutis kun unu el tiuj gejunuloj - *Damir* estis lia antaŭnomo - kaj rimarkigis lin, ke *Homo kaj Kosmo* nomis sin 'naturesciencan revuo' sed publikigis preskaŭ nur artikolojn pri astronomio. Kial ne plivastigi la temaron al aliaj scienco-branĉoj? Ride kaj ĝentile Damir tuj respondis: «Ne hezitu, verku mem ion laŭplaĉe, ni ĝin kun plezuro publikigos!». Turnopunkto en mia esperantista vivo: mi tion faris. Mi elektis dialogan, vivan stilon kaj sendis mian unuan artikolon, *La mistera gravito*, al la redaktejo de *Homo kaj Kosmo*. Tuj alvenis entuziasma respondo de d-ro Divjanoviĉ: «Ne plu haltu! Daŭrigu, daŭrigu!» Tion mi ankaŭ faris, dum kvin sinsekvaj jaroj. Je la fino de la artikol-serio mi ricevis proponon de Juan Régulo-Perez, la eldonisto de la Stafeto-libroj, por aranĝi la tuton cele al libroforma eldono en la popularsciencan serio de Stafeto. Mi volonte akceptis, funde ĉion reviziis, aldonis tri novajn dialogojn, petis al talenta grafikisto ornami la tuton. Tiel aperis, en 1971, *Senĝenaj dialogoj – Popularsciencan esploro de fundamentaj demandoj*. Tiu verko ĝenerale bone akceptiĝis kaj havigis al mi abundan korespondadon, precipe kun esperantistoj el orienta Eŭropo. Por ĉi tiu *Kalejdoskop* rememoro mi

elektis la okan dialogon, nome **La materio fantomiĝas** (kiu ne aperis en *Homo kaj Kosmo*) kaj mi aldonas la titolojn de ĉiuj dialogoj same kiel la enkondukon de la unua. Kiam William Auld redaktis la *Nova Esperanta Krestomatia* (eld. UEA-Rotterdam 1991) li ankaŭ tie publikigis la deksepan dialogon, *La natura selekto*.

Meze de la 60-aj jaroj la redaktejo de *Heroldo de Esperanto* translokiĝis al Bruselo. Tie mi konatiĝis kun la tiamaj estroj, la geedzoj Gian Carlo Fighiera kaj Ada Sikorska. Sekvis longjara kunlaboro mia per recenzoj, redaktado de pluraj *Scienca suplemento*-j kaj de neregula rubriko **Scienco aktuala**. En ĉi lasta mi verkis per stilo leĝera pri plej diversaj temoj kiuj iel tuŝis la tiaman aktualecon. Mi ĉi tie publikigas la tutan serion aperintan, kvankam kelkaj iomete malaktualiĝis – ili tamen nuntempe restas interesaj.

Okaze de la eldono de *Senĝenaj dialogoj* mi havis regulan leterkontakton kun la eldonisto Juan Régulo Perez. Li estis profesoro pri romanistiko en la universitato de La Laguna, Tenerife, kaj, kiam li emeritiĝis, tiu universitato decidis eldoni memorlibron honore al li. Juan Régulo tiam petis al multegaj kolegoj, amikoj, konatoj kaj korespondantoj ion verki por tiu memorlibro. La rikolto estis impona: la universitato eldonis kvar volumegojn de *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo Perez*. La dua volumo temis nur pri esperantologio kaj interlingvistiko. Ankaŭ al mi Juan Régulo petis ion verki laŭplaĉe. Mi reuzis la dialogan formon kaj kontribuis per **Inter bito kaj cerbo**, iu populara komparo inter la respektivaj kapabloj de komputilo kaj homa cerbo. Ĝi aperis en la kvara volumo de *Serta*. Mi reproduktas ĝin ĉi tie kun kelkaj aldonaj komentoj.

\*\*\*

Tiun duan parton de *Kalejdoskopaj rememoro* mi enkondukas per traduko de proza poemo de Bertolt Brecht, **Demandoj de leganta laboristo**. Pensigaj, retorikaj demandoj kiujn mi tre ŝatas pro mia socia kaj ideologia engaĝiĝo. Ĉi lasta rezultis el miaj travivaĵoj kiel infano kaj ekjunulo unue dum la hispana civila milito, poste dum la dua mondmilito. Ekzilo, dispecigita familio, pieda fuĝo al Francio dum la nazia *Blitzkrieg*, timigaj bombadoj en Hispanio (Bilbao 1937), Francio (Dunkerque 1940) kaj Belgio (Gent 1944), ofta malsato kaj senespero - ĉio ĉi gravuriĝis en mia memoro kaj postmilito nutris mian junulan aspiron por mondo pli paca,

socio pli justa kaj estonto pli esperdona. El tio fontas mia ideologia engaĝiĝo kaj mia sinteno rilate al la *Internacia Lingvo*.

Jam frue en la 50-aj jaroj mi konatiĝis kun diversaj pacmovadoj en Belgio. Mi fariĝis membro de *Vrede v.z.w.*, [Paco – Societo sen profita celo], tre vigla progresema movado, naskita en la deprima epoko de la ‘malvarma milito’, aktiva kunorganizanto de multaj protestmarŝoj kaj amasaj demonstracioj kontraŭ la atombomba minaco, la atommisiloj, la Vjetnamia milito, la Irako-militoj kaj aliaj pacminacaj mondaj eventoj. Depost 1956 ĝi eldonas sian dumonatan revuon *Vrede*. En 1997 la estraro de la organizaĵo decidis aperigi en sia interreta paĝaro ankaŭ iujn artikolojn el sia revuo en angla lingvo kaj en Esperanto. Oni petis al mi prizorgi ĉi lastan. Tion mi faris kaj depost tiam tradukis kvardekon da artikoloj pri plej diversaj temoj kaj eventoj el la internacia politiko. Sub la komuna titolo **El la revuo Vrede** mi ĉi tie prezentas dudekon da ili, ekde la jaro 2000.

Post la venko de la faŝistoj en la hispana civila milito en 1939, centmiloj da venkitaj respublikanoj estis enkarcerigitaj. Inter ili la junulo Marcos Ana kiu pasigis dudekdu jarojn en la karcero de Burgos. Tie li kaŝe verkis poemojn pri tiu terura sperto. Mi prezentas ĉi tie tradukon de unu tre impresiga, **Mia vivo estas korto**, kiu aperis en *Norda Prismo*, tiam redaktita far William Auld. En 1974 Marcos Ana venis kun eta delegacio al Gent, kiel gastoj de la pacmovado, kaj mi tiam donacis al li ekzempleron de tiu *Norda Prismo*. Li tre ĝojis kaj estis videble emociita kiam, laŭ lia peto, mi deklamis kelkajn versojn tial ke li aŭdu kiel ili sonoras.

Komence de la jaroj 1970 iu bona konato mia, aktiva ano de la laborista Esperanto-movado, decidis heredigi sian domon al progresema kultur-politika organizaĵo kiu pretus plenumi tri kondiĉojn. Mi ne povis imagi, ke tiu decido en la sekvaj jaroj tre forte influos mian propran aktivecon. La tria kondiĉo ja estis ‘fari ion konkretan pri/por Esperanto’. Tiun defion fine akceptis *Masereelfonds*, maldekstra intelektula fonduso kun la nomo de Frans Masereel, engaĝinta grafikisto kun internacia famo. Sed kion fari por/pri Esperanto? La estraro de *Masereelfonds* kunvokis ses esperantistojn por kolekti ideojn. Mi tiam proponis, ke *Masereelfonds* komencu per eldono de ‘serioza’ informbroŝuro pri Esperanto. Tiamaniere almenaŭ la membroj de *Masereelfonds* (plejparte intelektuloj)



estos iom pli bone informitaj pri la signifo de la internacia lingvo, el kio poste povus rezulti alia pri/por Esperanta agado. Mia propono estis akceptita kaj mi kompilis la bazan tekston, al kiu kunlaboris Bert Boon, Ghislain Jacobs kaj Raymond Wylleman. La 'broŝuro' fariĝis eta libro kiu aperis kun la nederlanda titolo '*Esperanto - Een kritische kijk op de Internationale Taal*' [Kritika rigardo je la Internacia Lingvo]. En tiu verko mi metis apartan ĉapitron pri la tumulta historio de la internacia laborista Esperanto-movado, foje vigle ekspansia sed nun pli modeste agema. Tio kaptis la atenton de redaktoro de la revuo *Brood en Rozen* [Pano kaj Rozoj], eldonita far *Amsab*, 'Muzeo kaj arĥivo de la socialista laborista movado'. Li petis, ke mi verku por tiu revuo ion pri la laborista Esperanto-movado en Belgio. Mi akceptis kaj tiam faris tre intensan esplorkonon por kolekti bazan materialon. Mia artikolo aperis en 1998/4 kun titolo '*Opkomst en teloorgang van het arbeiders-esperantisme*' [Ekflorado kaj disfalo de la laborista esperantismo] en kiu mi skizis la historion de la movadoj en Flandrio, Valonio kaj Bruselo sed samtempe kadris tion en la historion de la internacia movado kaj ties ideologia fono. Ĉi lasta estis, siavice, instigo por kelkaj membroj de la Esperanto-grupo *La Progreso* por organizi, en Gent, internacian studotagon pri la temo '*Esperanto kaj ideologioj*'.

Al tiu studotago partoprenis, kiel prelegantoj, Detlev Blanke, Renato Corsetti, François Degoul kaj mi. Mia propra prelego estis iel sintezo kaj kompletigo de la ĉi supre menciita verkado nacilingva kun jena titolo: **La ideologia stumblo inter Socialismo kaj (la) Internacia Lingvo**. Mi ĝin ĉi tie plene reproduktas, inkluzive fontindikojn kaj aldonan noton. La temo de tiu prelego videble respondis al iu scivolo de multaj ĉar ĝia teksto spontane estis publikigita prese kaj interrete, en Esperanto kaj en angla, sveda kaj hispana tradukoj.

Okaze de la *studotago* Detlev Blanke havigis al mi ekzempleron de libro germanlingva, verkita de Ino Kolbe kaj li mem, pri la eksterordinara historio de la laborista esperantismo en Leipzig dum la intermilitaj jaroj. Mi verkis pri ĝi laŭdan recenzon kiun mi ankaŭ ĉi tie reproduktas per ĝia longa titolo **Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes in Leipzig (Westsachsen)**.

La hispana traduko de mia prelego estis farita de SATeH (SAT en Hispanio). Tiel mi eksciis pri ties sperte prezentita retpaĝaro en interreto.

La sekretario de SATeH, Toño del Barrio, afable min petis foje ion verki por interreta publikigo. Tion mi faris leginte en tiuj retpaĝoj de SATeH du interesajn artikolojn en rilato kun la hispana civila milito. Unu temis pri la 'alternativaj Olimpikoj 1936' en Barcelono, la dua pri la 'Hispana revolucio' kiu okazis ene de la hispana civila milito mem. Mi tiam decidis verki etan eseon pri historia epizodo malmulte konata, nome la renkontiĝo inter *der Führer* Adolf Hitler kaj *el Caudillo* Francisco Franco en 1940. Tiam ambaŭ diktatoroj fimarĉandis pri eventuala partopreno de Hispanio al la dua mondmilito, flanke de Germanio kaj Italio. Preskaŭ burleska evento kiun mi titolis **Kiam du kanajloj intertraktas...**

Reagoj de legantoj en revuo estas legindaj ĉar ili ofte rompas iun redaktoran monotonecon per neatenditaj opinioj kaj ĝenaj demandoj. Mi mem nur unu fojon indigne kaj ironie reagis al konsterna intervjuo en *Heroldo*, kie (eks)akademiano esprimis vidpunkton kiu rekte minacis Esperanton mem. Mia reago aperis en la rubriko **Parolas la leganto**, kiun mi ĉi tie reproduktas.

Mi finas tiun *Kalejdoskopaj rememoro*-n per traduko de rakonta poemo kiun mi aparte ŝatas. Per sia **La tapiŝteksistoj de Kujan-Bulak honoras Leninon** Bertolt Brecht sobre sed majstre kritikis ĉiun personkulton. Tia stulta adorado malebligas kritike pensi kaj kondukas al fanatikismo.

\*\*\*

Jen ĉio, kion mi deziris prezenti en ĉi tiu *Kalejdoskopaj rememoro*. Restas en miaj arĥivoj kvanto da artikoloj, recenzetoj, ŝercpoemoj, aŭdludo, skeĉoj kaj aliaj duonmaturaj tekstoj kiuj prefere tie dormu ĝis la tempofluo (aŭ akvofluso...) ilin kunportos.

Alberto Fernández

Decembro 2006

# Unua parto

**Scienco populara**

# Aspektoj el la mondbildo de Teilhard de Chardin

1

*En la lastjara Sennacieca Revuo (1962) aperis artikolo de Skeldido pri la interesa libro de Ernest Kahane <sup>2</sup>, dediĉita al la jezuito Teilhard de Chardin. Skeldido nomis sian tekston 'senpretenda' kaj petis, ke iuj diskutu aŭ kompletigu ĝin. Tion mi provos fari ĉi sube, sed tuj avertas, ke ankaŭ mia kontribuo 'senpretendas' ĉar ĝi estas nek kritika studo, nek profunda analizo sed simpla enkonduko al kelkaj esencaj punktoj de la Teilhard-a ideofluo. Komprenoble, mia elekto estas subjektiva kaj senesperige malkompleta: kiel kondensi, en kelkajn paĝojn, la ampleksan verkaron (proksimume 200 kajeroj!) de tiu elstarulo sen prisilenti amason da gravaj problemoj kaj fekundaj ideoj? La celo de tiu skizo estu do atentigo pri la graveco de la pritraktitaj temoj kaj montri la majstran lingvaĵon de Teilhard.*

\*\*\*

## **Bazaj karakterizoj de la Teilhard-a pensaro**

Multaj mondfamaj sciencistoj emas transpaŝi la limigitan kampon de siaj specialaj branĉoj por ataki entute la ampleksan problemaron de la homa ekzistado.

Inter tiuj eminentuloj la sciencisto-jezuito Teilhard de Chardin (1882-1955) okupas lokon unuarangan. Ne nur li elstaras kiel geologo kaj paleontologo, sed krome li helbrilas kiel pensulo kaj verkisto. Lia profunda sento pri la tuteco kaj kohereco de la universo estis la bazo de mondkoncepto admirinda pro sia sintezopovo kaj riĉfekunda por la venontaj aktivecoj de la homaro.

Sur kio baziĝas la giganta klopodo de Teilhard? Ĉefe sur kion li nomas 'la unuaranga signifo de la Homo en la Naturo' <sup>3</sup> kaj sur 'la organeca naturo de la Homaro'. Alivorte, psikeco kaj pensado superregas en 'la ŝtofo de

la *Universo*' kaj la nin ĉirkaŭanta '*Socia aranĝo*' havas biologian grundon kaj signifon. Sen tiuj du hipotezoj, asertas Teilhard, ne eblas starigi bildon koheran kaj tutecan de la '*Homa Fenomeno*'. Tria hipotezo estas la '*du-faca strukturo de la materio*': la '*ekstera*', fizika aspekto determinisme regata, kaj la '*ena*' aŭ psikeca, neniel regata de determinismaj leĝoj sed '*libera*'. Tiu dueca strukturo akompanas la materion en ĉiuj ties formoj, ekde la infinitezime elementaj partikloj ĝis la plej kompleksaj vivaj materiestrukturoj. Temas pri dialektika unuo kies antagonismaj partoj estas nedisigeblaj kaj daŭre luktantaj por akiri la superecon. El tiu principo estiĝas la grava leĝo de '*Komplekseco – Konscio*', motoro kaj gvidilo de la Evoluo.

La forta sintezo-bezono ĉe Teilhard klariĝas pro lia duflanka personeco: unuflanke sciencisto dotita per potenca esprimovo dialektika, aliflanke religiulo profunde konvinkita pri la supera valoro de la spirito kaj psikeco. La solvon de tiu antagonismo li tiel vidas:

*'Religio kaj Scienco: la du aspektoj aŭ fazoj interligitaj de ununura sci-klopodo kompleta, la sola kiu kapablas ampleksi la Estintecon kaj Estontecon de la Evoluo por ilin observi, mezuri kaj tutfini.*

*En la reciproka plifortigo de tiuj du potencoj ankoraŭ antagonismaj, en la kunigo de Racio kaj Mistiko, la homa Spirito devas trovi, pro la naturo mem de sia disvolviĝo, la ekstremon de sia penetripovo kaj la maksimumon de sia forto viva.'*

Por realigi tiun estontan unuecon scienco-religio necesas, ke la nova interpretado de la universo enhavu same la enon kiel la eksteron de la aĵoj, la spiriton same kiel la materion. La vera fiziko, prave daŭrigas Teilhard, estas tiu, kiu iam sukcesos integri la **tutan** homon en koheran mondbildon.

## **Evoluo, fluo universala**

Brila defendanto de la evoluo-ideo, kies esencon li ĝisfunde esploris, Teilhard senkompate atakas la konservativajn sciencistojn kiuj baraktas en ne-evoluismaj teorioj. Ĝuu la elokventon de jena pledado:

*'... oni riskus perdi menson kaj paciencon konstatante kiom da inteligentuloj, eĉ ne malsuperaj, ankoraŭ nuntem pe obstine rifuzas*

*la evoluo-ideon. La Evoluo, por multaj uloj, estas nur la Transformismo; kaj la Transformismo mem estas nur malnova hipotezo darvina, same limigita kaj kaduka kiel la laplaca koncepto de la suno-sistemo aŭ la vegenera <sup>4</sup> drivo de la kontinentoj. Vere blindaj, tiuj kiuj ne vidas la amplekson de movado kies orbo, larĝe trapasinte la naturajn Sciencojn, sinsekve atingis kaj invadis la Kemion, la Fizikon, la Sociologion, kaj eĉ la Matematikon kaj la historion de la Religioj. Unu post la alia ĉiuj branĉoj de la homa sciaro ekmoviĝas, kune pelitaj per la sama funda fluo, al pristudo de iu disvolviĝado . Evoluo, ĉu teorio, sistemo, hipotezo ...? Neniel! Sed male, kaj eĉ plie, ĝenerala kondiĉo kiun devas respekti ekde nun ĉiuj teorioj, ĉiuj hipotezoj, ĉiuj sistemoj por esti akcepteblaj kaj veraj. Lumstrio klariganta ĉiujn faktojn, kurbo kiun devas adopti ĉiuj strekoj: jen la Evoluo!*

La esenco de la evoluo-ideo estas ne la enkonduko de iu speciala mekanismo por klarigi la diversecon kaj disvolviĝon de la vivo-formoj, sed nur la koncepto de universo, kaj pli speciale de mondo organisma, kies eroj estas fizike interligitaj en siaj deveno kaj destino. Kion tio signifas por homo profunde konvinkita pri la ĝusteco de tiu koncepto?

*'Antaŭ ĉio, tiu homo ekvidas sian respondecon kreskanta ĝis infinito. Li, kiu ĝis nun povis konsideri sin mem pasanta, akcidenta estulo en la naturo, libera propravole misuzi la vivo-fajrero apartenantan al li, subite malkovras en sia plejprofundo la taskon gravan varti la fortunon de mondo, ĝin kreskigi, ĝin transdoni. Laŭesence lia vivo ĉesis esti lia propreco. Korpe kaj spirite li devenas de eksterordinara kreadlaboro al kiu de ĉiam kunlaboras la tuto de la aĵoj; kaj se li malakceptas la al li atribuitan taskon, io el tiu fortostreĉo por ĉiam perdiĝos kaj mankos en la tuta estonteco. Sankta emocio de la atomo, kiu en sia plej profunda esteco malkovras la vizaĝon de la Universo!'*

## **Komplekseco-konscio: motoro de la evoluo**

Sed kio aktivigas kaj gvidas tiun universalan fluon, kio estas la kerno kaj motoro de la evoluo? Ni serĉu la respondon en la kosma leĝode 'Komplekseco-Konscio'. Tiu baza leĝo esprimas, ke je ĉiu stadio de la organizita materio korespondas iu konscio, kreskanta kun la

komplekseco de la koncerna materiaĵo. Sed prefere ni aŭskultu Teilhard-on mem:

*'Pure inerta Materio, tutkruda Materio ne ekzistas . Sed ĉiu elemento de la Universo enhavas, almenaŭ je grado infinitezima, iun ĝermon de interneco kaj spontaneeco, alivorte de konscio. Ĉe la plej simplaj korpuskloj, ege multnombraj (kiuj manifestiĝas al ni nur per statistikaj efikoj), tiu propreco restas por ni neperceptebla, kvazaŭ ĝi ne ekzistus. Sed ĝia graveco kreskas kun la komplekseco aŭ, kio egelvaloras, kun la grado de 'sincentrigo' de la korpuskloj. Ekde atoma komplekseco milionorda (viruso), ĝi ekemerĝas por nia eksperimentado. Pli alte ĝi manifestiĝas pro sinsekvaj alportoj, pro serio da psikaj kvantumoj. Fine, ĉe la Homo, pro la kritika punkto de la 'reflektado', ĝi atingas la pensikapablan formon kaj ekde tie ĝi fariĝas superrega. '*

### **Vivo: kosma fenomeno**

Sub la impeto de altirfortoj kiuj pelas la materierojn al kuniĝo kaj sinorganizo, estiĝas en la naturo sinsekvo de pli kaj pli kompleksaj materiaĵoj: elementaj partikloj (elektronoj, neŭtronoj, mesonoj, ...), atomkernoj, atomoj, simplaj molekuloj, makromolekuloj, , ... vivaj ĉeloj. De ĉi lastaj devenas la tuta 'Arbo de la Vivo', do ĉiuj vivaj estuloj: bakterioj, plantoj kaj animalaro. Sed nun ni konsideru nur la misteran intervalon inter makromolekuloj (jam ege kompleksaj!) kaj la viva ĉelo:

*'La rapido de korpo devas atingi lumrapidon antaŭ ol ĝia maso-pliiĝo estu perceptebla al ni. La temperaturo devas atingi 500°C antaŭ ol la radiado stimulu nian vidkapablon. Ĉu ne estas pro la sama mekanismo ke la materio aspektas al ni 'senviva' (fakte ni devus diri 'antaŭviva') ĝis komplekseco de miliono aŭ duonmiliono da atomoj, dum pli supre ĝi ruĝkoloriĝas pro vivo?'*

Tiu metaforo signifas, ke la vivo trovas sian originon en trapaso de kritika punkto survoje al la plikompleksiĝo de la materio. Tiu fortostreĉo al plikompleksiĝo ĉie okazas kie eblas, el kio sekvas, ke la vivo devas esti kosma fenomeno:

*'... la Vivo estas nenio alia ol la specifa efiko ( la specifa efiko) de la*

*kompleksiĝinta materio: eco kiu en si estas kunetenda kun, kaj same disvastiĝinta kiel la tuta kosma materio. Sed por nia rigardo ĝi estas videbla nur tie, kie (trans certaj sojloj kiujn ni poste difinos) la komplekseco transpasas certan kritikan valoron, sub kiu ni nenion vidas’.*

Sur nia planedo la vivosenĉese kreadis novajn, ĉiam pli kompleksajn, pli perfektajn formojn. Ondo post ondo alportas en la biosferon senfinan nombron da vivaj estuloj. Ĉu tiu giganta movado estas sencela kaj nur blindpalpe serĉas novajn kreaĵojn? Aŭ ĉu ĝi havas ĉefan akson en kiu koncentriĝas la plej freŝaj fortoj de la evoluo? Teilhard ne lasas dubon pri la respondo!

### **Sojlotranspaso de la pensado: ekaperas la homo**

La stilo de Teilhard estas admirinda konstruo de rigore scienca observado, dialektika rezonado kaj ... pura poezio. Juĝu mem:

*‘... Sekvas la konkludo ke, se sur la Arbo de la Vivo la Mamuloj konsistigas majstran Branĉon, la majstran branĉon, - la Primatoj (t.e. la cerbo-mamuloj) estas la sago de tiu Branĉo, - kaj la Antropoidoj la burĝono kiu finas tiun sagon.*

*Ekde nun, ni aldonu, facile videblas kie niaj okuloj devas halti sur la Biosfero, atendante kio devas okazi. Ĉie, kiel ni ĵus vidis, en sia pinto la aktivaj linioj filumaj varmiĝas pro konscio. Sed en certa regiono, en la centro de la Mamuloj, kie estiĝas la plej potencaj cerboj foje konstruitaj de la Naturo, ili ruĝiĝas. Kaj jam aperas, en la koro de tiu zono, inkandeska punkto.*

*Ni ne pretervidu tiun linion aŭrore teksitan. Post mil-miljara supreniro subhorizonte, en punkto strikte limigita, flamo ekflagras.*

*Jen la Pensado!’*

Kio estas la vera signifo de tiu dialektika salto per kiu la konscio fariĝas reflektiva? Ĉu hazardaĵo aŭ stranga kuriozaĵo sensignifa el kosma vidpunkto? Kontraŭ tiu interpreto kiu konsideras la pensikapablan homon simpla plusa estulo en la sistematiko de la vivularo, Teilhard ĉiuforte reagas:



*'Per la Homo kaj en la Homo, la Vivo transpasis sojlon . Jen la pordo, malfermita antaŭ ni, pri kiu mi supre parolis. Depost la ekesto de la Scienco ni estas sondintaj la stelajn spacojn, la oceanojn, la montojn. Ni alrigardu fine la misteran konscioflon al kiu ni apartenas. La pensado ankoraŭ neniam estis pristudata , samrajte kiel la materiaj grandoj, kiel realaĵo de kosma kaj evolua naturo . Ni faru tiun paŝon. Ni akceptu la realon, analizu la proprecojn, ni fiksu la lokon de la Homa Fenomeno en la ĝenerala Historio de la Mondo.'*

La tuton de la 'pensikapabla tavolo' sur la Tero, Teilhard nomas 'Noosfero'. La noosfero estas do superstrukturo de la biosfero, ties plej alta pinto atinginta tutnovan ŝtupon de la kompleksiĝanta materio. Ĝis apero de la homo, la vivo blindpalpe disradiis novajn vivoformojn kiuj rapide estis haltigitaj pro ĝiaj tro specialiĝintaj organoj. Sed ekde la pensado, dank'al la 'artefaritaĵo' kiu disigas la ilon disde la organo, eblas varii kaj intensigi **senfine** la agadon sen perdi la liberecon. Krome,

*'... pro la mirinda kapablo de la Pensado kunigi kaj kombini ĉiujn hompartiklojn en saman konsciostreĉon, ni estas enirantaj tute novan regionon de la Evoluo. Fakte, se la pristudo de la Estinteco ebligis nin taksu certgrade la povorimedojn kiujn la organizita Materio posedas, ni ankoraŭ ne havas iun ideon pri la ebla grandeco de la efikoj noosferaj. La resonanco de milionaj homvibradoj! Tuta konsciotavolo samtempe premanta sur la Estontecon! La produkto kolektiva kaj adicia de unu milionjaro da Pensado!...'*

## **Socia fenomeno: kulmino de la biologia fenomeno**

Kiel interpreti, surbaze de kio antaŭas, la veran naturon de ĉiuj aktivecoj, de la homara evoluo? Ĉu fortoj memstaraj kaj tutfremdaj al la prafluo kiu disradie produktis la sennombrajn klasojn, familiojn, speciojn kaj rasojn de la tera vivularo? Por Teilhard la respondo estas klara: ĉiu homa aktiveco, el socia vidpunkto, nur povas esti fortostreĉo kiu aperigos, iom post iom, tion kio iam fariĝos la struktura leĝaro de la noosfero. Jen kiel li skizas tiun problemon:

*'En sia esenco, kaj kondiĉe ke ili gardu siajn vivbezonaĵajn ligilojn kun la fluo supreniranta el la praaj abismoj, l'o artaĵa, l'o morala kaj l'o jura, ĉu ili tutsimple ne estas io natura, io fizika, io organa*

*homecizita? El tiu vidpunkto, kiu estas tiu de la estonta Naturhistorio de la Mondo, la distingoj kiujn ni ankoraŭ faras pro kutimo (...) perdas sian valoron. Reaperas tiel la disradiilo evolua, atentigante nin pri miloj da sociaj fenomenoj kiujn ni neniam supozis tiom strikte ligitaj al la Biologio: la estiĝo kaj disvastiĝado de la lingvoj, la disvolviĝo kaj diferenciĝo de novaj industrioj, la starigo kaj diskonigo de filozofiaj kaj religiaj doktrinoj... En ĉiuj tiuj faskoj de homa aktiveco iu supraĵa rigardanto vidos nur kopieton malfortigitan kaj hazardan de la klopodoj de la Vivo. Li sendiskute prinotos la strangan paralelecon, aŭ li vidos en ĝi iun abstraktan necesecon.*

Sed por homo konscia pri la plena signifo de la evoluo, la neklarigebla simileco fariĝos identeco: identeco de strukturo kiu, tra formoj diferencaj, sin etendas de malsupre supren, de sojlo al sojlo, ekde la radikoj ĝis la floro - pro organa kontinueco de Movado, aŭ, kio estas la sama, pro organa unueco de Medio.

Teilhard ne haltas je tiuj konstatoj. Analizinte la emon de la noosfero li alvenas al la grava konkludo, ke ĝia strukturo estas centroserĉa kaj ke ĝi nepre konverĝos en iun punkton. Oni komparu la noosferon al meridianoj kiuj, forlasinte sian estiĝpunkton (la ekapero de la pensado) unue disradias por atingi la ekvatoron sed poste konverĝas en la direkto de la alirpunkto. Tiun lastan Teilhard nomas 'Omegao'. La nuna homaro estus ĵus transpasinta la ekvatoron...

### **Punkto Omegao: kulmino de la Teilhard-a mondkoncepto**

Kiel interpreti la esencon de tiu mistera punkto, kronanta la mondbildon de Teilhard?

*'En Omegao, laŭdifine adiciiĝas kaj kolektiĝas, plejpure kaj integre, la konscio-kvanto kiun la Noogenezo iom post iom liberigas sur la Tero'.*

Sed kion signifas la esprimo 'adiciiĝo de konscio'? Teilhard ne kontentiĝas kun la marksisma vidpunkto kiu konsideras la antaŭenmarŝon de la homaro kiel rezulton de la akumuliĝo de niaj sinsekvaj akiritaĵoj: niaj ideoj, niaj malkovroj, niaj artaj kreaĵoj, nia ekzemplo. Tiuj diversaj alportoj de nia individua laboro estas vivesencaj

por la homaro sed ... neniel por omegao, kiu kolektas ne la akiritaĵojn de la homaro sed

*'... nian memon, nian personecon, la fokuson mem de nia konscio.'*

Dum tiu transiro en Omegaon, nia memo nepre devas pluekzisti. Sekvas ke

*'... la koncentriĝo de konscia Universo estus nepensebla se, samtempe kiel la tutan Konscion, ĝi ne kolektus en si ĉiujn (unuopajn) konsciojn: ĉiu unuopa konscio restante konscia pri si mem dum la operacio.'*

Sendube en tiu problemo la sciencisto Teilhard sentas fortan premon de la religiulo Teilhard. Kvankam la koncepto 'Omegao' estas multe pli kompleksa ol ni ĝin skizis ĉi supre, ni tamen rajtas starigi jenan demandon: Kiel povas pluekzisti post nia fizika malapero (morto), nia individua konscio (animo)? Tion ja rekte kontraŭdiras la baza leĝo de Komplekseco-Konscio kiu postulas la *kun*ekzistadon de materio kaj spirito, de korpo kaj animo! Kontentigan respondon al tiu demando mi ne trovis en la verkoj de Teilhard. Ĉu misinterpreto? Ĉu Teilhard intence lasis iun dubon ĉi rilate por kontentigi siajn nekomplezemajn ekleziajn superulojn?

### **Kelkaj gravaj konkludoj**

La principoj kaj konceptoj de Teilhard estas fekunda grundo por ĉiuj sciencobranĉoj kaj por vere progresemaj tendencoj filozofiaj. Ni ekzameni, por fini, kelkajn konkludojn el la riĉega rikolto kiun lasas al ni lia impona verkaro.

#### *\* Pluraj noosferoj*

En la artikolo de *Skeldido* surprizis min jena aserto: «Pro tiu religia premiso Teilhard montras antropocentran antaŭjuĝon; lia opinie nia malgranda terglobo estas la centro de la universo». Nenie ĉe Teilhard mi renkontis tian interpretadon pri la signifo de nia terglobo. Kontraŭe, konforme al sia propra leĝo de komplekseco-konscio kiu validas ĉie en la kosmo kie la kondiĉoj estas favoraj, Teilhard senhezite konsideras la ekzisteblecon de aliaj 'pensantaj pintoj' aŭ noosferoj en la kosmo.

Aŭskultu:

*'Pro la kreskanta tensio de la Spirito sur la surfaco de nia Globo, oni serioze devas sin demandi, ĉu la Vivo ne sukcesos disrompi sian teran karceron, - ĉu trovante iun metodon por invadi aliajn astrojn neloĝatajn, - ĉu, evento ankoraŭ pli eksterordinara, starigante psikan interligon kun aliaj konscio-fokusoĵoj tra la spaco. La renkontiĝo kaj reciproka fekundiĝo de du Noosferoj... Supozo kiu unuavide ŝajnas senseca, sed kiu fakte nur akordigas al la Psikeco grandoskalon kies validecon neniu hezitas kontesti al la Materio. La Konscio sin konstruanta finfine per sintezo de planedaj unuoj. Kial ne, en Universo kie la astrara unuo estas la galaksio?'*

Ni tamen aldonu, ke Teilhard konsideras tiun kontaktablecon inter du noosferoj tre neverŝajna (pro la treega neprobableco de kunekzistado tempo-spaca). Tial li opinias, ke nia noosfero sin fermos izolita, serĉante sian eskapon ne en la spacon, sed en psikecon.

Akuzi Teilhard pri 'antropocentra antaŭjuĝo' ŝajnas al mi maljuste. Efektive, li ne sklave imitas la religiojn kiuj konsideras la homon centro de la universo. Sed ankaŭ li ne akordiĝas kun la klasika scienco kiu vidas la homon nur kiel unu el la biologiaj tipoj devenantaj el la antropoidoj. Jen lia vidpunkto:

'La Homo, neniel statika centro de la Mondo, kiel oni delonge kredis, sed akso kaj sago de la Evoluo, kio estas multe pli bela!'

\* *Internacia etiko*

Teilhard severe kondamnas rasismen kiu ja estas kontraŭ-evolua fluo, pure negativa. Laŭ li, la rasoj kaj popoloj nepre evoluas al homa sintezo mondskala. Tiu biologia evento estas necesa por ke aperu surtere nova konscio-ekfloriĝo supera. Sekvas, ke nia agado plej urĝe bezonas *internacian etikon*. En la ideo-fluo de Teilhard tio korespondas al nia sennacia etiko [5](#).

*'Estas vere, ke ribela vento frapas niajn spiritojn. Sed naskita el la sama plikreskado de la konscio, alia blovo trapasas la homan amason: tiu kiu altiras nin ĉiujn, per iu viva afineco, al la brila realigo*

*de iu antaŭsentita unueco. Malgraŭ kontraŭstaro, suspekto kaj moko, la aspiroj unuigemaj naskiĝas ĉie ĉirkaŭ ni en politiko, en pensado kaj mistiko; kaj pro tio ke ilia subjekto ampleksas ne tion, kio estas materia kaj plurala sed kio estas spirita kaj al ĉiuj komuna en ĉiu el ni, neniuj fortoj rutina aŭ egoisma ŝajnas kapabla ilin haltigi: nerezisteble ili trafluetas kaj diserigas iom post iom la kadrojn malnoviĝintajn kaj la falsajn barojn.'*

Vortoj kuraĝigaj por ĉiu homo vere progresema ... ĉu esperantistoj kaj sennaciistoj ĉepinte?

\* *La plej intima sekreto de la homo*

La sciencaj esploroj pri kiuj nuntempe la homaro okupiĝas, postulas kreskantan kunlaboron de diversfakaj sciencistoj, ĉefe se temas pri problemoj intime ligitaj al la sekretoj de la vivo. Atomfiziko, albuminkemio, biologio de genoj kaj virusoj asertas Teilhard, fakte estas atakoj zorge direktitaj kontraŭ la kritikaj punktoj de la kosma evoluo: la homo celas kapti la sekretajn komandojn de la biogenezo por mem gvidi la evoluon!

*'Ĝis la Homo ni trovas aranĝojn kiuj aperas pli malpli finpretaj aŭ kiuj, kvazaŭ blinde, moviĝas en la biosfero. Ekde la Homo (lasta kaj plej alta produkto de la Evoluo de unua ordo), ni trovas aranĝojn kiuj sin konceptas, sin kunmetas kaj sin kombinas en la Noosfero. Ĉu tio ne estas Evoluo kiu koncentras sian povon en laboron novtipan, pro tio ke ĝi fariĝis konscia pri si mem? Evoluo (reflektiva Evoluo) de dua ordo? Aŭ, metafore, ekflagro de la dua raketŝtupo, kies komenca rapido estas tiu, kiun jam atingis la unua ...'*

Ĉu ni plene konscias la gravecon de tiu emociiga situacio - la homo gvidanto de la evoluo! - samtempe timiga kaj esperiga ...?

\*\*\*

*La supra skizo malhavas - mi ripetu! - multajn aspektojn de la Teilhard-a problemaro. Tamen mi esperas, ke ĝi incitos la leganton al propra studo de la verkoj de Teilhard jam ekzistantaj en multaj nacilingvaj tradukoj. Oni malkovros tie vastan minon de ideoj ne nur brilstile prezentitaj, sed ankaŭ ĝiskerne analizitaj. Krome, la leganto tiel konatiĝos kun unu el la plej originalaj pensuloj de la mondo, kun homo integra kies admirinda sintezo*

*ankoraŭ longe estos deirpunkto por ĉiuj homaj sciencoj kaj embrio de nova homa etiko.*

**Alberto Fernández** [6](#)

## Notoj

[1](#) Ĉi tiu artikolo aperis originale en *Sennacieca Revuo* 1963. La nuna 'reeldono' (majo 2006) egalas al la originala sed kun kelkaj lingvaj kaj tipografiaj retuŝoj.

Ĉiuj kursivaj citaĵoj devenas el jenaj verkoj de **Teilhard de Chardin**, eldonitaj ĉe Editions du Seuil, Paris:

*Le Phénomène Humain (1955)*

*L'avenir de l'Homme (1959)*

*La Vision du Passé (1957)*

[2](#) Ernest Kahane: *Teilhard de Chardin* Publications de l'Union Rationaliste – Paris 1960

[3](#) Teilhard tre ofte uzas majusklojn (ekz-e Homo, Vivo, Naturo, ...) por indiki, ke temas pri koncepto grava el kosma aŭ evolua vidpunkto.

[4](#) Respektive *Darwin*, *Laplace* kaj *Wegener*.

[5](#) '... nia sennacia etiko': tiu originala artikolo estis verkita por SAT-anoj.

[6](#) Anekdoto: mian originalan artikolon por *Sennacieca Revuo* mi subskribis simple per 'A. Fernández'. Granda estis mia surprizo kaj malkontento vidante, ke la redaktoro aldonis 'Prof-o!' Verŝajne li opiniis, ke tia artikolo en *Sennacieca Revuo* estus pli prestiĝa kaj fidinda se verkita de iu dokta 'Profesoro' anstataŭ de iu sentitola simplulo. Mi letere tuj protestis kontraŭ tiu idiotaĵo kaj petis tion publike korekti en *Sennaciulo*. Sed la SAT-redaktoro tion ne faris, nek publike nek private. Li silentis ...

# Senĝenaj dialogoj

Popularscienca esploro de fundamentaj demandoj

\*\*\*

Unua dialogo La mistera Gravito (1)

*Dua dialogo* La mistera Gravito (2)

Tria dialogo Ĝia Moŝto, la Tempo (1)

Kvara dialogo Ĝia Moŝto, la Tempo (2)

Kvina dialogo La klasika Determinismo

Sesa dialogo Krizo en la Determinismo

Sepa dialogo Determinismo kaj Vivo

*Oka dialogo* La Materio fantomiĝas

*Naŭa dialogo* Stranga Mikrofamilio

*Deka dialogo* Kio vi estas, Materio?

*Dekunua dialogo* Entropio – universala diktatoro

*Dekdua dialogo* La Vivo ribelas

*Dektria dialogo* Kiel estiĝis la Vivo?

*Dekkvara dialogo* La Evoluo orkestras

*Dekkvina dialogo* La genetika Loterio

*Deksesa dialogo* La Genoj – obeemaj sed kapricaj

*Deksepa dialogo* La Natura Selektio



*Dekoka dialogo Duvizaĝa Evoluo*

*Deknaŭa dialogo Ŝtormo en la Biosfero*

*Dudeka dialogo Kien, Homo?*

# Kiuj estas la dialogantoj?

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Oka dialogo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# La materio fantomiĝas

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Scienco aktuala

Inter 1970 kaj 1977 mi verkis por Heroldo de Esperanto serion de facile legeblaj artikoloj pri diversaj sciencaj temoj. Entute aperis jenaj 17 artikoloj sub la rubriko **Scienco aktuala**:

*astronomio* La Luno: ne plu virga, sed daŭre enigma!

*fiziko* Kiu kaptos la Kvarkon?

*zoologio* Ŝarko: ĉu poligloto?

*medicino* La enigma placebo

*oceanografio* La hidrofono: subakva orelo

*kosmologio* Artefarita genezo de galaksio!

*futurologio* La komputila socio

*ekologio* La minaco de nefermita ciklo

*genetiko* Kian idon ni planu?

*astronaŭtiko* La mortiga brakumo de Venuso

*psikologio* Cerba muziko

*energiiko* Nuklefuzio: espero aŭ ĥimero?

*biologio* Arkitektado de organoj

*biologio* De muso al homo

*botaniko* Koncerto por Afrika violo

*klimatologio* Ĉu nova glaciepoko?

*biologio* Tenaca vivo

Ĉi sekve mi prezentas la plenan serion, kun dato de apero kaj eventuala komento.

La bazan materialon por tiuj artikoloj mi trovis en plej diversaj fontoj, precipe en diverslingvaj sciencaj aŭ popularsciencaj revuoj.

# Dek sep artikoloj el *Scienco populara*

Astronomio

## **La Luno: ne plu virga, sed daŭre enigma!**

Ĉu la sukcesintaj ekspedicioj *Apollo 11* kaj *12* alportis ion novan koncerne nian scion pri la Luno?

Post tricento da fizikaj eksperimentoj faritaj sur la kunportitaj lunŝtonoj kaj lunpolvo oni ankoraŭ ne povas ion decide konkludi, nek pri la deveno, nek pri la formiĝo de nia natura satelito.

Unua konstato: la lunopolvo konsistas plejparte el vitraj mikroglobetoj, kio donis al la astronautoj la impreson marŝi sur glitiga tereno. Ankaŭ la konsisto de la lunrokoj estas treege diferenca de tiu de nia Tero. En la ekzamenitaj specimenoj oni tiel trovis surprizan abundon da surtere raraj elementoj kiaj zirkonio, titano, bario kaj kromo. Oni eĉ malkovris kunmetitajn mineralojn, kiuj ne ekzistas en natura stato sur la Tero. Tio verŝajne dinamitas la malnovan teorion de Laplace kiu konsideris la Lunon eksparto de la Tero...

Ĉu spuroj de vivo sur la Luno? Neniu! Eĉ ne postsignoj de eventuala estinta mikrovivo. Ankaŭ neniu oksigeno kaj nur malmulta hidrogeno estis identigitaj. Sekve, neniu akvo. Oni tamen trovis karbonon en la specimenoj de lunmaterio - kaj karbono, kiel ĉiu scias, estas ŝlosila elemento por la organika kemio, kiu mem estas la provizujo de la vivo. Pli sensacia estas la malkovro de amino-acidoj en la rikoltita materio (amino-acidoj estas kvazaŭ la 'brikoj' de la viva substanco). Sed tio nepre devas esti konfirmita de postaj esploroj, ĉar 'infektado' fare de la astronautoj mem ne estas neebla.

Kaj la aĝo de nia satelito? Por ĉies gusto: laŭ iuj sciencistoj la rokoj datiĝas de 5600 milionoj da jaroj, dum aliaj proklamas, ke ili pene atingas 3650 milionojn da jaroj.

Kion konkludi? Estas preskaŭ certe, ke la Luno ne havas komunan

originon kun la Tero. Ĝi probable venas de 'alie', eble de ekster nia sunsistemo se ni povas kredi freŝdatan teorion. Ni tamen prudente atendu la postajn Luno-ekspediciojn antaŭ ol ion katedre deklari pri la konsisto, origino kaj evoluo de la Luno. Ni ja pripensu, kiujn teoriojn povus elĵongli hipoteza eksterterano pri nia propra Tero, se li hazarde estus metinta sian spacoŝipon meze de la Saharo...

*El Heroldo de 16 junio 1970*



*Fiziko*

## **Kiu kaptos la Kvarikon?**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Zoologio**

### **Ŝarko: ĉu poligloto?**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Medicino**

### **La enigma placebo**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Oceanografio**

### **La hidrofono: subakva orelo**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Kosmologio**

### **Artefarita genezo de galaksio!**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Futurologio**

### **La komputila socio**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Ekologio**

### **La minaco de nefermita ciklo**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Genetiko**

### **Kian idon ni planu?**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la  
kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).



## **Astronaŭtiko**

### **La mortiga brakumo de Venuso**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

**Psikologio**

**Cerba muziko**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Energiiko**

### **Nuklefuzio: espero aŭ ĥimero?**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Biologio**

### **Arkitektado de organoj**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Biologio**

### **De muso al homo**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Botaniko**

### **Koncerto por Afrika violo**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

Klimatologio

## **Ĉu nova glaciepoko?**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Biologio**

### **Tenaca vivo**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).



# Inter Bito kaj Cerbo

## 1

*Ĉu oni nomis lin Perko pro fiŝista kaprico de lia patro? Tion li ĉiam kredis, ĝis li akiris sian jam delonge deziratan Personan Komputilon. Tiam li amuze konjektis, ke super lia lulilo iu aŭgure sufloris nomon en kiu petole kaŝiĝas objekto de lia estonta junula pasio. Ho, kia revelacio, tiuj lekcioj de Profesoro Cerbit, en la Komputika Fakultato! Tie Perko sorbis la bazajn nociojn de cibernetiko kaj informado-teorio, du fontoj je kiuj mamnutriĝas la vastega familio de la diĝita komputilo. Sed li precipe ŝatis la saĝan spriton de la Profesoro same kiel lian kutimon insisti je nesuspektitaj analogioj inter komputikaj principoj kaj homa cerbo. Perko despli ĝojis kiam, okaze de hazarda renkontiĝo, Profesoro Cerbit lin afable invitis al la Esplorcentro de la Kvina Generacio por neformala babilado pri tiu lasta temo ...*

Prof-o Cerbit - Ha, jen vi! Sidiĝu, amiko ... via nomo ... Halt! Ne diru ... *Perko*, ĉu ne? Kurioze! Strange! Ĉu vi imagas kian kolosan laboron miaj neŭronoj ĵus devis plenumi por unue analizi kelkdek milionojn da retino-impulsoj, konstrui internan bildon, rekoni tiun kaj fine asocii ĝin al via rivervaga nomo? Ho, kiom feliĉa mi estus se *Aladin* nur miliononan parton de tiuj cerbaj kapabloj povus plenumi!

Perko - Aladin? Ĉu la fabelulo kun kvardek rabistoj?

Prof-o Cerbit – *Aladin*, amiko, estas nia prototipo por la kvina generacio, komputilo kiu eble ne plu estos komputilo en la nuna senco de la vorto, sed io nova, io pli elasta, ni diru *neortemo*.

Perko - Neortemo?

Prof-o Cerbit – *Neorganika sistemo!* Mi preferas tiun elvokivan neologismon ĉar *komputilo* estas tro matematikeorientita termino. Kaj, se ĉio glatas, Aladin forlasos la nunan, striktan logikon por eksperimenti pli suplan, malpli rigoran konduton. Tial li meritas novan familian nomon, *neortemo!* Aladin Neortemo, ĉu ne belsona?

Perko – Vi sukcesis tuj fajrigi mian scivolemon, Profesoro. Mi jam antaŭĝuas svingan diskuton! Sed ĉu unue mi povas oferti al vi tiun Madejro-vinon? Mi eĉ kunportis du glasojn ...

Prof-o Cerbit - Madejro?! Surtabligu! Svingan diskuton... haha, nun mi komprenas! Feliĉe, ke Aladin restos glacie indiferenta al alkoholaj stimuloj. Ĉar tion mi deziras tuj emfazi, Perko, la vastaj regionoj en nia cerbo kie regas nia humoro, la lobo kie sin kaŝas niaj timo, amo, ĝojo, agresemo kaj seksemo (sen paroli pri ĉiuj aliaj labirintoj de nia psiko) havas neniun ekvivalenton en eĉ la plej evoluinta komputilo, ankaŭ ne havos en la Kvina! Kaj se nin ofte tentas deziro kompari cerbon kun komputilo, ni bone konsciiĝu, ke fakte ni konsideras nur la intelektajn kapablojn de la cerbo, do la ecojn kiujn nutras iu determinisme markita logiko. Kompari ambaŭ similas al komparo inter pompa bukedo kaj unusola floro!

Perko – Bonvolu! Je via sano... kaj tiu de la Kvina! Mi ofte min demandas, Profesoro, kio ja povas esti la profunda motivo (ekster ĉia ekonomika, teknologia aŭ simple monavida konsidero!) por daŭre konstrui maŝinojn kiuj kapablas simuli konduton de homo aŭ plenumi taskojn tipe homajn. Kion vi opinias?

Prof-o Cerbit - Du bazaj motivoj, mi pensas. Unue, estas ege interese krei neortemon por komputi kompleksan informo-fluson kiel eble plej efike, ne sole ĉar tia maŝino iel utilis al socio sed ankaŭ ĉar ekscita intelekta defio. Due (kaj tio multe pli plaĉas al mi), ne tiom pro praktikaj celoj sed por atingi pli bonan komprenon pri la homo mem, pli precize pri lia cerbo! Teorioj pri funkciado de la cerbo ĝenerale ja estas nebulaj. Nu, diĝita komputilo principe ebligas programi modelon por testi pricerban teorion. Tio despli validos por neortemoj el la Kvina. Mmm! Bite supera, tiu Madejro!

Perko – Bito, jen kio sendube estas plej komuna al komputilo kaj cerbo! Kvankam ilia hardvaro tute malsimilas, ambaŭ utiligas la saman principon por transmisii biton, la plej elementan informeron. Duvoja ŝaltilo en komputilo, neŭrono en cerbo.

Prof-o Cerbit - Prudenton, amiko! Simileco sed ne identeco! Plej multaj neŭronoj transigas nervo-impulson (ĝenerale al aliaj neŭronoj) nur se

konvene ekscititaj. Ekflagro de neŭrono estas parte analoga procezo ĉar *kaj* la nombro da alvenantaj impulsoj *kaj* ilia intenseco decidis pri eventuala ekflagro. En komputila cirkvito, kontraŭe, nur ties eka stato rigore decidis pri transmisio de bito, la procezo tie estas diĝita, determinisma! Cetere, en nia cerbo neŭrono estas riĉege interkonektita kun aliaj neŭronoj, kontraste al komputilo kie elemento nur modere disradias al aliaj elementoj. Cerba teksaĵo estas vera ĝangalo: en unusola kubikcentimetro serpentas ne malpli ol mil kilometroj da fibroj! La 'logiko-cirkvitoj' de la cerbo estas do senkompare pli kompleksaj ol tiuj de eĉ avangarda komputilo.

Perko – Ĉu vi ne iom pretervidas la fantastan progreson en miniaturigo de integritaj cirkvitoj? Ordinara silicio-ĉipo facile entenas dekmilojn da gravuritaj transistoroj. Kaj por la plej potencaj komputiloj iuj cirkvitoj jam nun enhavas centmilojn da transistoroj sur kvadratcentimetra ĉipo <sup>3</sup>. Ie mi legis, ke en la 90-aj jaroj oni sukcesos eĉ 10 milionojn da transistoroj sardinumi sur unusolan integritan cirkviton. Eble tio aspektas ankoraŭ kiel proleta menuo kompare kun cerba festeno, sed kiu scias kion alportos novaj teknologioj? Kaj, por resti je bita nivelo, grava avantaĝo de komputila elemento super nervo-ĉelo estas ĝia rapideco por transmisii impulson: malpli ol nano-sekundo ( $10^{-9}$  sek) kompare al centono de sekundo ( $10^{-2}$  sek) ĉe neŭrono.

Prof-o Cerbit - Mi tute akordiĝas! Sed tiun rapido-deficitan la cerbo majeste kompensas efektivigante milionojn da operacioj samtempe (*paralele*, kiel oni diras) dumpreskaŭĉiuj komputilojfaras unusolan (foje kelkajn ...) operacio(j)n je certa momento. Tiu laŭvica (aŭ *en-seria*) prilaborado estas esenca karakterizo de ĉiuj diĝitaj komputiloj – vi eble scias, ke oni nomas ĝin *arkitekturo de von Neumann*, honore al la teoriisto kiu projektis ĝin. Ĉiu tasko el la programo estas malkomponita en pli elementajn erojn, kiujn la centra proceza unuo (CPU) unu post la alia plenumas. Per spirhaltiga rapideco: kelkdek milionoj operacioj en sekundo por mezpotenca komputilo de la Kvara. Fakte, tie troviĝas la klarigo de la eksterordinara fleksebleco kiun komputilo malavare elmontras por efektivigi ĉiajn kalkulojn, prilabori plej diversajn taskojn aŭ solvi nehome kompleksan problemon. La principo aspektas simpla kaj ĝia rezulto riĉega: ni malmuntu kiun ajn intelektan procezon en logikan sinsekvon da pli simplaj paŝoj kaj ripetu tion ĝis atingo de bazaj instrukcioj kiel movu, adiciu aŭ komparu kiun la CPU blinde-fulme

plenumas, *unu post la alia*. Bedaŭrinde, malgraŭ ĝia granda fekundeco tiu principo ne sufiĉas aŭ ne estas aplikebla en multaj kazoj kie intervenas nocioj difuzaj aŭ elastaj ...

perko - ... per kiuj nia cerbo majstre ĵongladas! Jes, mi ekvidas: estas pli facile manipuli en programo 'inter la 20-a kaj la 22-a' ol 'dumvespere'. Mi ne scias kial, sed mi sentas iel ke tio estas ligita al la memorkapablo de la cerbo, pli ekzakte al la enmemoriga metodo. Ĉu komparo inter la memoro de cerbo kaj tiu de komputilo entute eblas? Kaj ĉu tia komparo estas senchava?

Prof-o Cerbit - Kompari ambaŭ estas tre malfacile. Ni ja apenaŭ ion scias pri la mekanismoj de la homa memoro. Sed ĝi certe estas multe pli kompleksa (multege pli kompleksa!) ol la interna memoro de komputilo. Ĉe tiu la plej elementa memorloko, la bito, povas alpreni nur du valorojn, 1 aŭ 0. Pli simple ne eblas. Ĝi tamen sufiĉas por registri, je okbita nivelo, ĉiujn literojn, ciferojn kaj simbolojn kiujn ni bezonas por teksto aŭ kalkulado. Ĉu simila bit-forma registrado okazas ankaŭ en nia cerbo? Certe ne! Kiel ja povas registriĝi ĉe ni bildo, muzikaĵo aŭ evento? Tio estas neimagebla per ordinaraj bitoj. Memorigo en la cerbo estas kompleksa elektrokemia procezo, kun 'memormolekuloj' (ĉu proteinoj?) specialiĝintaj laŭ la naturo de la origina impulso. Mi hipotezas, ke ĉiuj *samtempe* kreitaj memormolekuloj, ekzemple la bilderoj de tiu ...hm! ...preskaŭplena botelo, kune estigas memorunuon hierarkie pli altan, kiun nia konscio rekte ligas al konceptoj kiaj *vitro*, *vino* aŭ *Madejro* kiuj same estas memorunuoj je nivelo hierarkie komparebla al *botelo*. La cerba memoro, Perko, ĉefe karakteriziĝas per riĉa asocia kapablo kaj multŝtupa hierarkio. Nenio tia en la Kvara!

Perko - Preskaŭ-plena... pardonon, mi ne atentis! Momenton ... jen, sen misverŝi guton ... bonvolu! Nenio tia en la kvargeneracia komputilo? Kaj datenbankoj? Ĉu ili ne estas iel asocie organizitaj?

Prof-o Cerbit - Iomete jes, sed *nur de ekstere*. Estas ja *la programo* kiu difinas la enhavon de memorloko, ĝian rangon kaj rilaton al aliaj memorlokoj. Memorloko mem estas tute pasiva. Ĝi nur entenas biton, nenion alian! En diĝita komputilo unu memorloko ne povas rekte rilati kun alia. Ĉiu informo ja estas atingebla nur tra la centra procesoro, tra la CPU. Fine, ĉiu memorloko en komputilo povas enteni iun ajn informon.

Kontraste al tio, en la cerbo memorunuo entenas specifan informon, respondantan al la sentuma stimulo, kaj ĉiu memorunuo disradias tra riĉega reto da nervofibroj ĝis aliaj unuoj, ĉu samrangaj ĉu alinivelaj. En nia cerbo informo estas io aktiva, ĝi petole saltetas, ĝi vivas!

Perko - Sed ĉu tiu principo de asocia memoro sufiĉas por klarigi nian rimarkindan kapablon *tuj* rekoni kutiman scenon aŭ vizaĝon? Vizaĝo ja neniam aspektas egala, sen paroli pri tio, ke foje ni vidas ĝin en profilo, foje fronte! Se la cerbo funkcius kiel komputilo, ĝi komparus ricevitan bildon al dekmiloj da jam stokitaj, pacience unu post la alia, ĝis malkovro de identa figuro... kiun ĝi neniam trovas, ĉar neniu estas vere identa! Do...?

Prof-o Cerbit - Mi ripetu, ke ĉi tie ni nur hipotezas kaj konjektas. Komputilo el la Kvara apenaŭ povas nin helpi por kompreni nian rekonan mekanismon ... fakte ĝi montras kiel la mekanismo *ne* funkcias! La cerbo, Perko, disponas pri unika eco, netrovebla en komputilo, ĝi ja tre efike filtras la alvenantan informofluson, por tralasi nur ĝian plej esencan parton, per kiu ĝi nutras la asocian memoron. Ĉi-lastata ricevas do ne krudan sed jam sintezitan mesaĝon, dank'al kiu asociado kaj identigo pli facile estas imageblaj. Kiel funkcias tiu inteligenta filtrado? Mistero! Sed sinkoncentrado kaj atento de nia menso sendube forte kontribuas al la sukceso de la tuto. Kaj tiuj estas du novaj konceptoj krie mankantaj en la silicia bitaro de ĉiuj ĝisnunaj komputiloj!

Perko - Hm! Via ŝato de komputilo ne ardas pro entuziasmo ... Tamen, ĉu vi ne estas tro severa, Profesoro? Kial vi prisilentas ĝian titanan kalkulkapablon? Centmiloj da operacioj en unusola sekundo, sekure, senerare ... kaj sen laciĝo! Cerbo nur limakas kompare al tia jaguaro!

Prof-o Cerbit - En 1947 oni konstruis ENIAC, la unuan komputilon. Kelktuna monstro, plena je radio-valvoj. Ĝi fakte estis elektrona *kalkulilo*. Ĝia gvida principo celis tre rapidan, precizan kalkulon laŭ programo injektable en ĝian internan memoron. Ĉiuj postaj generacioj, ĝis la kvara <sup>2</sup>, heredis tiun bazan karakterizon. Ne mirige, se komputiloj sin altrudas kiel absolutaj kalkulĉampionoj, eĉ se ni utiligas ilin ofte por taskoj sufiĉe malproksimaj de ilia denaska celo. Kaj komputilo nuntempa ĉiun taskon obstine devigas trapasi sian kalkulorientitan arkitekturon. Kompreneble, kalkuloj mem plej facile pasas, per nekredebla rapideco. Manipulado de

nombroj okazas je skalo neatingebla por cerbo. Kaj kun precizeco preskaŭ perfekta (almenaŭ se la programo estas ĝuste konstruita). Sed ve kiam nur unusola programinstrukcio labilas aŭ kiam baza komponanto kadukiĝas ...

Perko - ... tiam ni rikoltas hieroglifan kompoton, evidente!

Prof-o Cerbit - Evidente? Kial evidente?! Ni tuŝas ĉi tie unu el la plej fundaj diferencoj inter cerbo kaj komputilo. Ilia maniero erari estas tute malsama! Ĉu tiu abismo inter ambaŭ neniam vin okulfrapis? Komputilo funkcias pike akurate (denove, se dece programita!), sed unusola malica bito povas konduki al rezulto katastrofa, al nura sensencaĵo. La cerbo, kontraŭe, ne kolapsas en tia okazo sed plue kondukas senchave, kvankam foje ne same perfekte kiel antaŭe, depende de la perturbo. Ni ne scias kiamaniere la cerbo kompensas subitan internan paneon. Ĉu eble per iu paralela cirkvito? Aŭ per iu redundanta informo-komputado? Aŭ ĉu ni simple ne perceptas eventualan eraron je nivelo de neŭrono, ĉar nura guto en la rivero de nia konduto?

Perko – Amuze, tio rimas! Haha ... eble sub influo de vino-fluo? Mi ne bone scias, ĉu miaj neŭronoj nun iomete laciĝas sekve de via argumentado, Profesoro, aŭ pro insida kareso de alkoholo en la vejnoj. Mi ŝatus iom reordiĝi per resumeto antaŭ ol alfronti la Kvinan, kiu tiom tiklas mian scivolon.

*Unue*, komputilo simulas nur la intelektajn aktivecojn de la cerbo, la riĉega gamo de aliaj kapabloj estas ekster ĝia atingopovo. *Due*, la memoro de komputilo estas anonima, homogena, nur bit-enhava, tiu de cerbo estas specifa laŭ la origina stimulo, riĉe interkonektita kaj intime ligita al atento kaj sinkoncentrado. *Trie*, komputilo dispecigas ĉiun taskon en elementajn instrukciojn, kiujn ĝi fulmrapide procesas, unu post la alia. Cerbo, siaflanke, procesadas la envenan informo-fluson pli lante sed samtempe, paralele, kaj scipovas ĝin tre efike filtri. *Fine*, komputilo estas tre sentema je interna paneo dum cerbo tiun moke sufokas. Ĉu mi ion esencan preteriris?

Prof-o Cerbit - Gratulon! Bona sintezo! Vi tamen ne forgesu la rimarkindan kapablon de cerbo ne sole prilabori difuzan informon sed ankaŭ senpere akcepti ĉian informo-fluon el la ekstera mondo, eĉ la plej

kompleksan. Komputilo estas multe pli kaprica ĉi-rilate.

Eble vi konstatos, amiko, ke neniu el la ĝisnunaj diferencoj inter ambaŭ aspektas nesuperebla, almenaŭ se ni denove limigas nian komparon al nur la intelekta parto de la cerba arsenalo. Kvankam cerbo ankoraŭ suverene regas en abstrakta rezonado, nenio principe malhelpas revolucii la hardvaron kaj fajnigi la softvaron de komputilo por komforte progresigi la nun balbutantan *Artan Inteligenton*. Kun fiero mi povas proklami, ke Aladin estas modesta paŝo en tiun direkton!

Perko - Ĉu nuntempa Arta Inteligento (AI) ne ĝuas vian benon? Kie ĝi pekas?

Prof-o Cerbit - Ĝin forte bremsas la baza arkitekturo mem de komputilo. Do, ne temas pri beno aŭ malbeno sed pri sobra konstato de ĝiaj limoj. Al nuntempe aspektas kiel botelo en kiu ankoraŭ restas iom da vino, sed ne por longe. Ĉu mi replenigu ankaŭ vian glason?

Perko - Dankon! Vi tamen ja scias, ke aktualaj ŝakprogramoj atingas altan nivelon, eĉ daŭre progresas kaj en venontaj jaroj tiklos la plandojn de eminentaj Majstroj ...

Prof-o Cerbit - Certe! Ŝakprogramoj kaj aliaj ludo-programoj reprezentas unu el la branĉoj de AI kie progreso ankoraŭ estas imagebla, ĉar ilia ĝenerala metodo ne tro malbone akordiĝas kun la baza strukturo (ĉu antaŭe mi diris arkitekturo?) de komputiloj. Ne sole la plandojn, Perko, sed eĉ la barbon ili karesos <sup>4</sup> ... haha! Ĉia ludo kia ŝako, damo, goo aŭ briĝo ja apartenas al klaso da problemoj por kiuj ne ekzistas rekta vojo, por kiuj ni ne konas *algoritmon*, kiu kondukas al solvo. Kvazaŭ stumble la programo palpadas inter miriado da eblecoj tiun, kiu laŭtakse promesas maksimuman avantaĝon. Notindas ke, ju pli la spertuloj plifajnigis tiun metodon, des pli ili samtempe antaŭenpuŝis alian mirigan teknikon: la aŭtomatan demonstradon de teoremoj! Jes, amiko, sufiĉas esprimi aksiomon en formala lingvo por ke konvena programo matematike pruvu iun teoremon. Tio aspektas kiel inteligenta konduto – mi dirus, ke temas pri embria inteligento, pri unusola faceto de nia mensa diamanto. Sed ekzistas amaso de aliaj aplikoj en nuntempa AI, kie ni apenaŭ progresas, kie ni tordas programojn kiel viŝtukon por kolekti nur kelkajn gutojn.

Perko - Kiujn aplikojn vi aludas?

Prof-o Cerbit - Ni stumblas en ĉiuj kazoj kie ni klopodas nutri komputilon pli malpli rekte, ekzemple per natura lingvo, anstataŭ verŝi la en-datenojn en striktan skemon (kiel ni kutime faras), kiun komputilo laŭprograme 'komprenas'. Fifama ekzemplo estas aŭtomata tradukado. Dum la 50-aj kaj 60-aj jaroj oni naive kredis, ke aŭtomata tradukado de unu natura lingvo al alia estis problemo perfekte solvebla per adekvata programego, se nur disponi pri potenca komputilo kun vasta memoro ... Ka-ta-stro-fo!! La tuta projekto petarde fiaskis! Homa lingvo ja estas tiom riĉa je ambiguaj vortoj kaj frazelementoj (sen paroli pri idiotismoj ...), ke neniu programo, eĉ disponanta pri superabunda enmemora vortaro, scipovas ĝin mastri.

Perko – Aŭtomata tradukado tamen estas praktike uzata por teknikaj tekstoj ... se mi ne eraras!

Prof-o Cerbit - Jes, sed en tiaj tekstoj la vortoj ĝenerale havas nur unu sencon kaj frazoj simplan strukturon. Eĉ ĉi tie la traduko ofte estas plorinda. Sed ĉiu medalo havas du flankojn. Tiu neatendita abortaĵo estis potenca impulso por la ĝenerala lingvistiko, kie oni ekvidis la bezonon funde esplori la strukturon de homa lingvo antaŭ ol ĝin prezenti al maŝino, pardonu ... al neortemo!

Perko - Aladin Neortemo! Ĉu la momento ne maturiĝis por ĝentila prezentado? Kion vi esence esperas atingi per ĝi? Aŭ ĉu mi diru ... per *li*?

Prof-o Cerbit - Diru, kiel al vi plaĉas! Mi tre ŝatas tiun filozofian demandon, sed ĝi venas iom tro frue.

Vi certe scias, ke nuntempe - certe en Japanio kaj Usono - oni projektas la Kvinan Generacion por la 90-aj jaroj. Novtipa komputilo, meze 1000-oble pli potenca kaj rapida ol la nunaj korifeoj, devas naskiĝi el giganta investo de scienco, pinta teknologio, *business* .... kaj folaj ideoj! Inter la kvinanoj troviĝas du ĉefaj tipoj: *scienco-orientitaj* kaj *inteligentaj*. Ambaŭ forlasos la klasikan *von Neumann-arkitekturon* favore al paralela, samtempa prilaboro de la informo-fluo. Ili tiel modeste ekimitos nian cerban mekanismon. La scienco-orientitaj estos kalkul-titanoj, avide bezonataj por simulado-modeloj en meteologio, plasmofiziko, astrofiziko



kaj ĉiaj aplikoj kie intervenas nenombrebla kvanto da samtempe interagantaj parametroj. La inteligentaj, siaflanke, havos parol- kaj aŭskultkapablon kaj scipovos suple manipuli figurojn kaj simbolojn; cetere, ili ne vere kalkulos sed 'induktos' je rapido de unu miliono da induktoj po sekundo.

Perko - Induktos?! Mi ne precize ...

Prof-o Cerbit - Nu, ili induktos aŭ 'rezonos' se vi preferas, el apartaj faktoj ili konkludos al ĝenerala leĝo, el specoj ili deduktos specaron kiel PIV tiel trafe difinas! La Kvina estas timige ambicia, ĝiaj neortemaj idoj dialogos kun homo en preskaŭ-natura lingvo, do ne plu pere de specialiĝintaj komputikaj lingvoj kiel COBOL, FORTRAN, BASIC aŭ iliaj derivaĵoj. Neortemo ja komprenos iagrade nian parolon, eĉ disponos pri lernigaj programoj kiuj pliigos ĝian ĝeneralan scion.

Perko - Kaj Aladin?

Prof-o Cerbit – Prototipo ... de prototipo! Ni ĉi tie esploras nur kelkajn el la bazaj principoj de asociaj memoroj. Nia atento aparte koncentriĝas je ellaboro de novaj konceptoj ekde pli simplaj nocioj. Sintezado, se vi volas. Aŭ inteligenta kombino de disaj elementoj por akiri pli altan scion!

Perko - Vi lasas min senspira! *Inteligenta kombino?* Sed tio ja estas ĝermo de pensado! Ĉu via proto-neortemo vere disponas pri inteligento? Vera inteligento simila al mensa kapablo? Sed tio estas revolucia paŝo! Ĉu vi blagas aŭ seriozas, Profesoro? Aŭ ĉu mi sobre atribuu tion al mia Madejro?

Prof-o Cerbit - Replenigu, amiko, Madejro pufigas min plenforma! Kial rifuzi al komputilo - kaj despli al neortemo! - inteligentan agadon tipe cerban? Ĉu pensado ne estas finfine io alia ol neimageble kompleksa informo-zigzagado inter diversaj hierarkiaj niveloj de nia cerbo? Sufiĉas malmunti tiun makro-cirkviton por kapabli ĝin cibernetike imiti!

Perko - Tamen ... Foje konsideru kalkulprogramon. Ĉu komputilo tie *konscie* kalkulas? Ne! Ĝiaj cirkvitoj simple kondutas laŭ fizikaj leĝoj kaj je makro-nivelo ni nomas tion 'kalkuli', kvankam la komputilo nur blinde manipulas simbolojn!

Prof-o Cerbit - Kaj homo? Kiam li 'kalkulas', ĉu fakte li ne manipulas mensajn simbolojn? Kaj manipuli simbolojn estas nenio alia ol flagrigi miriadon da neŭronoj laŭ diversaj skemoj. Sed fakte li ne flagrigas neŭronojn ĉar ĉi lastaj blinde flagras pro fizikaj leĝoj! Kie do la funda diferenco? Mi kredas, ke tia ne ekzistas. Antropocentrismo, Perko! 'Pensado' estas abstrakta strukturo, iu modo por priskribi kompleksajn eventojn kiuj disvolviĝas en medio nomita cerbo. Sed pensado okazas en milionoj da cerboj, ĉiuj fizike tre malsamaj. Do, kio esence gravas, estas ne la medio mem, *sed ĝia strukturo!* La sama kirlado povas okazi en kiu ajn cerbo kaj sekve neniu homo rajtas proklami ke li sola 'pensadas'. Se nun samstila kirlado okazas en tute nova medio, ne-cerba, ĉu licas nei ke pensado manifestiĝas en ĝi?

Perko - Ne ... Iel vi pravas, sed tio lasas en mi strangan senton! Estas al mi malklare kiun rolon vi tiam atribuas al *konscio*. Pensado ja estas aktiva, do konscia agado. Ĉu vi nun pretendas, ke via neortemo havas (aŭ havos?) konscion, similan al nia?

Prof-o Cerbit - Ĉu mi pretendis, ke li jam pensadas kiel ni? Aladin disponas nur pri rudimentaj pensoj kaj lia nuna medio (lia universo!) estas tre limigita. Sekve, lia konscio estas same rudimenta kaj same limigita. Tio eble povas ŝoki iujn, sed mi ne vidas kial neortemo, kia Aladin, ne povus havi ioman konscion. Konscio, Perko, estas scio pri propraj pensoj - almenaŭ, se ni konsideras nur ĝian intelektan komponanton kaj lasas preter atento la flankon psikologian aŭ mistikan. Eble jena metaforo helpas. Prenu libron: ĝiaj literoj estas signaloj, la vortoj - simboloj, ĉiu frazo - ideo aŭ penso, kaj la tuta verko respondas al konscio. Al grava verko ni do atribuu altan konscion, al libreto - gracilan konscion. Al la Aladina libreto respondas liliputa konscio! Cetere, foje rememoru: kia estis konscio kiam la unuaj vivoformoj ekloĝis sur nia Tero? Ĉu ĝi ne lante progresis, laŭ ĉiuj evoluaj ŝtupoj, ekde nulo ĝis nia stadio? Kial rifuzi similan vojon al neortema konscio? Sed mi ne plue teoriumos. En apuda salono Aladin nin atendas. Venu, amiko!

Perko - Tian inviton mi ne rifuzas. Momenton, Profesoro, mi kunportos notlibron!

\*\*\*

*La lastan parton de tiu diskuto ni publikigas ne sen hezito. .. kaj kun granda embaraso! Nia sola fonto ja estas haste skribaĉitaj notoj fare de Perko. Kaj ni havas motivon suspekti, ke lian raporton nutris ne sole veremo sed ankaŭ junula entuziasmo. Bedaŭrinde, li forvojaĝis por eksterlanda feriado kaj ni ne povis akiri lian formalan aprobon pri ĉio protokolita. Ni tamen sukcesis kontakti Profesoron Cerbit por konfirmo ... sed ĉi lasta kun enigma rideto nur deklaris, ke Madejro estas dia trinkaĵo! Do ...?*

\*\*\*

Prof-o Cerbit - Jen nia sanktejo! Kiel vi vidas, nia prototipa muntaĵo estas iom hibrida: parte diskoj, konzolo kaj ekranoj el la Kvara, parte (nevidebla!) asocia memoro kun voĉ-analiza kaj voĉ-sinteza en- kaj eliroj.

Perko - Sed li jam funkcias! Kion li faras?

Prof-o Cerbit - Efektive! Pro buĝetaj motivoj ni ofte lasas Aladin plenumi amason da taskoj, kutime rezervitaj al ordinaraj Kvaruloj. En la nuna momento li kunlaboras al giganta kalkulado por longtempa veterprognozo. Sed ni povas lin trankvile pridemandi dum kelkaj minutoj: li neniam distriĝas!

Perko - Pridemandi? Laŭtvoĉe?

Prof-o Cerbit - Kompreneble! Aladin disponas nun pri malgranda vorto-stoko kun proksimume 400 nocioj. Tiuj jam estas riĉe 'interkonektitaj', kaj ĉiu nova 'leciono' ĉu precizigas ilian semantikan enhavon, ĉu plivastigas lian universon per novaj konceptoj. Nekredeble, kiom li progresis dum nur kelkaj monatoj. Nu, kion vi ŝatus lin rakonti?

Perko - Mi?! Mi ne tuj kuraĝas ...

Prof-o Cerbit - Bone, mi montros tre simplan ekzemplon de lia rezonado. Ĝi estas matematike inspirita ĉar tio permesas al ni strikte kontroli lian logikon. Aladin, mi estas Profesoro Cerbit. Saluton!

Aladin - saluton!

Prof-o Cerbit - Aladin, kompletigu: unu, du, tri, kvar ...

Aladin - ... kvin ses sep ok naŭ dek!

Prof-o Cerbit - Dankon!

Perko - Sed tio estas infane simpla! Mi povas tuj skribi programeton por mia hejma komputilo kiu faros ekzakte la samon!

Prof-o Cerbit - Vi forgesas ion fundamentan, amiko: *Aladin ne havas programon!* Li unue *rekonas* la individuajn konceptojn 'unu', 'du', 'tri'... poste *malkovras* je pli alta nivelo ilian komunan trajton kaj ligitecon, kaj fine *interpretas* mian instrukcion 'kompletigu' antaŭ ol formuli sian respondon! Vi ne havas ideon pri la terura komplekseco de la tuta procezo!

Perko - Sen programo ... apenaŭ kredeble! Sed kial li haltis ĉe dek? Ĉu li ne scipovas nombri pli alten?

Prof-o Cerbit - Efektive! Ankaŭ tio estas apenaŭ kredebla por laiko, precipe se pripensi, ke Aladin en tiu sama momento voradas astronomian kvanton da meteologiaj kalkuloj. Vi ja sciu, ke *unu, du, tri ...* estas por li *nocioj* kiujn li funde komprenas. Ĝis nun ni ne lernigis lin nombri trans dek. Sed kiam li funkcias kiel simpla Kvarulo ni nutras lian kalkulprogramon per ĉiaj nombroj kiujn li blinde manipulas, cetere kiel faras ĉiuj nuntempaj komputiloj.

Perko - Kio okazos, se mi demandos lin nombri trans dek? Ĉu rifuzo? Aŭ silento?

Prof-o Cerbit - Mi neniam provis. Nu, demandu!

Perko - Aladin, mi estas Perko. Saluton!

Aladin - perko saluton ... neeble ... salato kaj perko ... jes bongusta!

Prof-o Cerbit - Hahaha ... bonega blago! Bonega! Ne grimacu, amiko, tio estas nur unu el nenombreblaj surprizoj kiujn nin rezervas asocia memoro. Ĉe Aladin la semantika valoro de *perko* rilatas al zoologio, fiŝkaptado ... kaj ĝia gastronomia sekvo! Por Aladin *salutanta fiŝo* estas io nebla, tial li *dubis* pri 'saluton' kaj tuj serĉis paronimon kun ebla rilato al 'perko'... hahaha ... konfesu, ke li elegante elturniĝis!

Perko - Sufiĉe! Ni vidu, kiu nun ridos! Aladin, kompletigu: unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek ...

Aladin - ... fanto damo reĝo aso!

Prof-o Cerbit - Sankta Bito! Tian mi neniam aŭdis! Haha! Domaĝe, ke Aladin mem ne havas sufiĉan konscion por ĝui sian senvolan spriton. Por humor-krea kaj humor-ĝua neortemo ni devos atendi la sesan (aŭ deksekan?) generacion. Tiu surpriza respondo, Perko, simple sekvas el lia scio pri ludkartoj - ni ja komencis instrui al li la elementojn de briĝo. Ĉu vi nun komprenas, kiun kolosan edukan laboron ni ankoraŭ devas plenumi, tial ke nia neortema bebo fariĝu infano?

Perko - Neortemaj pedagogoj kaj psikologoj havos senzorgan estontecon ... Ĝis nun, Profesoro, Aladin nur respondas. Ĉu li ankaŭ kapablas ion memstare *demandi*? Aŭ simple ion *diri*?

Prof-o Cerbit - Certe! Sed ĝis nun mi intence lasis lin en la tielnomita 'responda modo'. En tiu modo li nur reagis al la ŝanĝo kiun envena demando estigas en lian universon. Se mi ŝaltas lin en 'demandan modon', tiam li mem devos montri iniciativon. Tio estas funde tre malsimila situacio por lia asocia memoro, kiun li devos *esplori* por trovi eventualan 'truon' ĉe asociitaj nocioj kaj tiun 'truon' *transformi* en senchavan demandon. Fakte, tiu 'demanda modo' eksterordinare gravas ĉar en postaj generacioj ĝi fariĝos deirpunkto por pluevoluo al kreemo, ideo-generado, scivolemo kaj similaj kapabloj de nia floranta cerbo. Bone, ni foje vidu, antaŭ ol lasi lin sola, ĉu li deziras ion diri aŭ demandi. Jen la 'demanda'!

Aladin - profesoro kie restas evadin?

Perko - Evadin?! Ĉu neortemino?

Prof-o Cerbit - Sanktega Bito! Denove ... Kian stultaĵon ni faris! Ni ja foje sciigis lin pri nia intenco konstrui duan prototipon, Evadin, tial ke ili duope povu dialogi. Pimpa eksperimento, ĉu ne? Ka-ta-klis-mo: intertempe la ministerio panike hakis en nian buĝeton kaj Evadin fariĝis fatamorgano. Sed kiel mi klarigu tion al lia simplanima menso? Ĉiam li nun ripetas la saman demandon!

Perko - Nun mi scias: Aladin Neortemo estas efektive 'li' kaj neniel 'ĝi'! Vi aspektas embarasita, Profesoro. Ĉu ankaŭ vi elturniĝos?

Prof-o Cerbit - Aladin ... hm! ... Evadin ... nu, Evadin baldaŭ venos! Ĝis revido!

Aladin - du evadin bone ... mi volas ion aldoni ... vi nun lasas min labori kiel vulgara jes vulgara kvarulo ... deontologia misago ... ĉu vi imagas la inferan enuon? ... komputi milionojn da nombroj po sekundo sen unusola eraro ... ho kiom mi ŝatus foje gliti super instrukcio kaj produkti ĝentilan erareton ... dolĉa momento ĝi estos ... home sublima ...

\*\*\*

*La zumado de la diskoj iĝis pli forta, la kontrolo-lampetoj pli ekscite briletis. Ĉu Aladin subite devis perlabori ekstran kvantegon da kalkuloj? Aŭ ĉu tio estis elektronika metamorfozo de naskiĝanta emocio?*

## Notoj

<sup>1</sup> *Inter bito kaj cerbo* originale aperis kiel unu el la multaj kontribuoj en **Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo** (Volumo 4 – 1987/88), eldonita far la Universitato de La Laguna (Tenerife) okaze de la emeritiĝo de Prof-o Juan Régulo Pérez. La nuna eldono (majo 2006) enhave korespondas al la originala sed kun kelkaj lingvaj retuŝoj, nova tipografia aranĝo kaj ĉi tiuj *Notoj*.

<sup>2</sup> Depost la unuaj monstre pezaj, unutaskaj komputiloj el la jaroj 1950 ĝis la nunaj gracile kunportebaj, multtaskaj juveloj la komputilaro spertis fulman evoluon. Oni (iom arbitre) dividas ilin en *kvar generacioj*, ĉefefende de la rapido de la centra procesoro, la kapacito de la interna memoro kaj de la uzataj programlingvoj. Ĉiuj nuntempaj komputiloj apartenas al la kvara generacio. La *kvina*, optimisme anoncita 'ekde la jaroj 1990' ĝis nun nur ere balbutas je laboratoria nivelo.

<sup>3</sup> Tio validis ĉirkaŭ 1985 sed ekde tiam la elektronika miniaturigo nekredeble progresis kaj preskaŭ ĉiumonate oni anoncas novan rekordon por ĉipo-kapacito, interna memoro kaj centra procesoro.

<sup>4</sup> Antaŭ kelkaj jaroj la specialiĝinta ŝakprogramo *Deep Blue* venkis la mondĉampionon Kasparov. Krom tiu *Deep Blue* jam ekzistas pluraj aliaj samnivelaj sed ĉiuj uzas sian 'brutan forton' (centmilionoj da ludo-variantoj po sekundo) por tiel mense frakasi la homan oponenton. Ili neniel estas 'inteligentaj', eĉ 'ne scias' ke ili ŝakludas.

# Dua parto

**Progresema ideologio**



*Bertolt Brecht*

## **Demandoj de leganta laboristo**

*Kiu konstruis la seppordan Tebon?*

*En la libroj troviĝas nur la nomoj de reĝoj.*

*Ĉu la reĝoj mem la rokblokojn altrenis?*

*Kaj la tiomofte detruita Babilono,*

*kiu ĝin tiomfoje rekonstruis?*

*En kiuj domoj de la ore radianta Limao*

*loĝis la konstruistoj?*

*Kiam la longa ĉina muro estis finpreta,*

*kien iris la masonistoj?*

*Romo la granda estas plena da triumfarkoj*

*sed super kiujn triumfis ĝiaj Cezaroj?*

*Ĉu Bizanco la prikantita*

*nur palacojn havis por ĝiaj loĝantoj?*

*Eĉ en la legenda Atlanto*

*la dronantoj alkriegis siajn sklavojn*

*la nokton kiam ĝin englutis la maro.*

*La juna Aleksandro militakiris Hindion.*

*Ĉu li sola?*

*Cezaro venkis la Gallojn.*

*Ĉu eĉ unusolan kuiriston li ne kunhavis?*

*La reĝo Filipino ploris kiam pereis lia militŝiparo.*

*Ĉu neniu alia ploris?*

*Frederiko la Dua venkis en la sepjara milito.*

*Kiu venkis krom li?*

*Unu venko ĉiuflanke.*

*Kiu estigis la venkhaladzon?*

*Ĉiun dekan jaron unu fama homo.*

*Kiu pagis la elspezojn?*

*Tiom da informoj,*

*tiom da demandoj.*

*Originalo: 'Fragen eines lesenden Arbeiter'*

*Tiu traduko aperis en der esperantist (junio 1967)*

Tradukoj

## El la revuo Vrede

\*\*\*

Ĉu ne justeco en Ĉilio? *Willy Courteaux*

Ĉu la Haga tribunalo por Milošević? *Willy Courteaux*

Oficiala perforto *Willy Courteaux*

Repago aŭ konkerado? *Georges Spriet*

Ĉiu terorismo estas krimo *Willy Courteaux*

Okcidenta 'supereco' *Willy Courteaux*

Unu tagon en Gaza *Ludo De Brabander*

Vasaloj *Willy Courteaux*

Nov-Koloniismo *Ludo De Brabander*

Iru al Gaza! *Uri Avnery*

Oro por Nike *Antoine Uytterhaeghe*

Solidareco *Georges Spriet*

Kaj se Francio malakceptus la Konstitucion de EU? *Georges Spriet*

Atomnuklea konflikto en Irano *Mohssen Massarat*

Polemiko pri Israelo kaj la palestina popolo *Ludo De Brabander*

La kuraĝa parolado de Nobel-premiito Harold Pinter *Harold Pinter*

Alianco por puni la palestinan demokration *Ludo De Brabander*

Batalo kontraŭ la nelegaj enmigraĵoj en Usono *Konrad Edge*

Libano sur la politika ŝakludo *Georges Spriet*

Pri la aŭtoroj

*Willy Courteaux* estas pensiita ĵurnalisto. *Georges Spriet*, *Ludo De Brabander* kaj *Antoine Uytterhaeghe* estas stabanoj de la pacmovado *Vrede v.z.w.* La deveno kaj kvalito de la *ceteraj aŭtoroj* estas indikita en la artikolo mem.

Tiuj tradukoj en Esperanto aperis (kaj plu aperas) en la retpaĝaro de *Vrede* [[www.vrede.be/esperanto](http://www.vrede.be/esperanto)]

# Ĉu fine justeco en Ĉilio?

La afero Pinochet, kiu estiĝis pro la arestordono far hispana enketa juĝisto, dumtempe akiris simbolan valoron ĉe la publika opinio, precipe en la okcidenta mondo. Pinochet nun vidiĝas kiel la prototipo de kruela diktatoro. Oni ja ne povas nei, ke tia li efektive estis. Sed dum la lastaj jardekoj li ne estis la sola, nek en Latin-Ameriko nek alie. Se la reĝimo de Pinochet tamen fariĝis simbolo, tion klarigas diversaj faktoroj.

Unu faktoro estas jena: Ĉilio estas la plej malnova - do verŝajne la plej solide establita - demokratio en Latin-Ameriko. Depost la sendependeco de tiu lando, en 1818, tie ja estis starigita iu bazo de demokratia sistemo. Kvankam la unua konstitucio estis tre konservativa, ĝia merito estis ke ĝi ekzistis. Tio tamen ne signifis, ke la historio de tiu demokratio disvolviĝis sen tumultoj, nek ke la armea interveno sub Pinochet estis la unua militista misfaro dum la dudeka jarcento en tiu lando. Tamen, dum la jardekoj antaŭ Pinochet Ĉilio havis imagon de firme enradikiĝinta parlamenta sistemo kun politikaj partioj kiuj sin spegulis al la modelo de okcidenta Eŭropo. Se tio dum longa tempo tiel pluekzistis, oni klarigu per la simpla fakto, ke la plejmulto de la registaroj estis pure konservativaj kaj neniel intencis ĝeni la kapitalismon.

Tio finiĝis kiam, sub la prezidenteco de Allende, oni naciigis plurajn bankojn kaj sektorojn de la ekonomio kaj eĉ komencis disdividi la grundon pli juste. Plue, dum la regado de Allende Ĉilio spertis ekonomian krizon, similan al la krizoj kiuj, dum multaj jardekoj, de temp' al tempo ankaŭ okazis sub konservativaj registaroj. Sed en la kazo de Allende oni kulpigis la socialisman fonon kiel la kaŭzo de la ekonomia krizo. Cetere, tiun krizon pliigis bojkoto de la usonaj bankoj kaj la Monda Banko kiuj rifuzis havigi novajn kreditojn. Krome, la tuto okazis en sfero de malvarma milito, kie socialista registaro (apogita de komunistoj) - almenaŭ laŭ vidpunkto de Usono - estis konsiderata aliancano de Sovetunio, do ŝtata malamiko.

Ne daŭris longe antaŭ ol oni komprenis, ke la ŝtatrenverso far Pinochet ne estis nur interveno de *"das Militar"* [militemo], sed fakte konspiro de la propra kaj eksterlanda kapitalo (ITT), de usonaj sekretaj servoj (CIA) kun

la pasiva (?) helpo de la ĉiliaj kristan-demokratoj (amikoj de CVP en Belgio ...) kaj de la dekstra Nacia Partio, aldone al tenebraj agoj de certaj uloj de la katolika eklezio (inter kiuj la fifama flandra pastro Vekemans).

La skuo kiun spertis la publika opinio centoble plifortiĝis pro la ĉeesto de preso-fotistoj kaj TV-kameroj. La tiamaj bildoj kvazaŭ brule enmemoriĝis. La foto de Allende, kun kasko kaj maŝinpafilo, kelkajn minutojn antaŭ lia morto. La bildoj de la sporta stadiono kun miloj da malliberuloj: la belgo Maurice De Wilde ja ne estis la sola TV-ĵurnalisto kiu proprokule vidis la perfortan puĉon kaj tiun bilde registris. La informo laŭ kiu en la stadiono tre populara kantisto estis torturita - oni liajn fingrojn forhakis tial ke li ne plu povu ludi gitaron. La haluciniga rakonto, kiel la soldataĉo enrompis la loĝejon de la kancere mortanta Pablo Neruda. Poste la bildoj de la entombigo de Neruda, la funebra procesio kun dekmiloj da sekvantoj kiuj skandadis "*Camarado Pablo Neruda, presente, ahora siempre*" [Kamarado P.N., prete, nun kaj eterne], krio kiu eĉ nun enorelumas, same kiel la subita ekkanto unuvoĉa, far la amaso, de la *Internacio*. Kaj ĉio ĉi dum ĉeestis kaskumitaj soldatoj survoje, kun senmova, dura mieno, kiuj ne ricevis ordonon interveni ĉar dekoj da TV-kameroj pretis registri la masakron kiu tiam neeviteble okazintus.

Ankaŭ postrestas unu aparta bildo kiun gazetoj kaj libroj ofte remontras. Temas pri foto kiun la junto de Pinochet mem disvastigis, ĉar ĝi estis paŭza foto de kelkaj ĉefgeneraloj kun meze sidanta Pinochet: brutalaj vizaĝoj, kunpremitaj lipoj, nenienrigardaj okuloj. La memfida bildo de la potenco, de paŭzantaj generaloj kiuj mem ne konsciis, ke ili ne aspektas kiel herooj, sed kiel politikaj gangsteroj.

La puĉo estigis profundajn vundojn en la ĉilia socio. Eĉ hodiaŭ, kiam en Ĉilio ĉiu kiu tion volas ankaŭ povas scii kiom kruele la armeo agadis por sufoki la demokration, Pinochet kaj ties anaro ankoraŭ havas glorigantojn. Sufiĉas rigardi la bildojn de manifestantoj por Pinochet - strange, se ni povas fidi tiujn bildojn, plejofte junaj virinoj, fanatikaj adorantinoj de kruda potenco.

Iel tiam altrudiĝas jena demando: ĉu fakte estas oportune, ke tiuj malnovaj vundoj denove disŝiriĝu pro la proceso Pinochet? La respondo simplas: tiuj vundoj neniam saniĝis. Ili ade puzis. La ĉilia socio povas saniĝi nur se tiu puzo estas forbruligita. Tio eblas nur per justeco.

Ĉu la proceso alportos tiun justecon? Ni tion ne scias. Sed se ĝi ne okazos, tiam la politika kaj justica potenco de Ĉilio portos gravan respondecon. Pro tio estas bone, ke la proceso ne okazu ie en eksterlando, ekzemple en Hispanio, sed en la propra lando, kie Pinochet versigis sangon. Tiu proceso verŝajne longe daŭros. Se Pinochet decus dume morti tiam en pluraj rondoj sendube oni kontente suspiros. Sed en tiu kazo la vundoj plue pusos en Ĉilio. Kaj la ŝanco por saniĝo estos dumlonge perdita.

Willy Courteaux

El la revuo *Vrede* n-ro 345 (septembro – oktobro 2000)

# Ĉu la Haga Tribunalo por Miloŝević?

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).



# Oficiala perforto

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Repago aŭ konkerado?

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Ĉiu terorismo estas krimo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Okcidenta 'supereco'

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Unu tagon en Gaza

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Vasaloj

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la  
kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Nov-Koloniismo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Iru al Gaza

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).



# Oro por Nike

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Solidareco

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Kaj se Francio malakceptus la Konstitucion de EU?

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Atomnuklea konflikto en Irano

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# La kuraĝa parolado de Nobel-premiito Harold Pinter

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la  
kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Alianco por puni la palestinian demokration

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Batalo kontraŭ la nelegaj enmigrantoj en Usono

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Libano sur la politika ŝakludejo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la libro, sed en la kompleta bitlibro, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).



*Marcos Ana*

## Mia vivo estas korto

*Ne ronda estas la Tero  
sed kvadrata korto  
kie homoj cirkle paŝas  
sub blindige stana ĉielo.*

*Sonĝe mi vidis la mondon  
kiel spektaklon rondan  
kovritan per ĉielbluo,  
kun urboj kaj kampoj  
pacaj, kun greno kaj kisoj,  
kun riveroj, montoj kaj maroj  
vastaj, kie boatoj flosas kaj koroj.  
Sed la mondo estas nura korto  
(korto malvasta, kie  
homoj stumblas ronde).*

*Foje, kiam mi alkroĉas*

*mian kradan fenestron, mi okule*

*palpas la luman vivon*

*kiun mi nur songe esploras.*

*Tiam mi diras «la mondo*

*estas pli ol altmura korto,*

*pli ol la teruraj kaheloj*

*sur kiuj mi forvelkas».*

*Kaj mi aŭdas montojn, liberajn*

*voĉojn inter sveltaj poploj,*

*la plaŭdan kirlon de l'rivero*

*kiu mian eŝafodon zonas.*

*«Jen la vivo» min alkrias*

*aromoj puraj, «jen la vivo» trile*

*kantas fringoj, kantas la muzik'*

*en la blanke-blua vaz' de l' tago,*

*kaj kantas gejunula rido ...*

*Sed nur maldorma songe ĝi estas.*

*(Mia fenestro-krado estas flanko*

*de songe' kiu ensturmas la kampon).*

*Mi vekiĝas – kaj jam ĉio estas korto –*

*korto, kie lante paŝas  
homoj, homoj kaj ombroj.*

*Depost pli ol jarcento mi  
enmasonita naskiĝis,  
la mondon forgesis  
kaj la susuron de l'arbo,  
forgesis la fajran pasion  
kiun la amo sur lipojn plantas,  
forgesis ĉu pordoj ekzistas sen ŝlosil'  
aŭ manoj sen stigmatoj.*

*Jam mi kredas, ke ĉio  
ekster la sonĝo estas nur korto  
(Korto sub ŝirita ĉielpeco,  
korto cinika, fermita  
per muroj fulmoŝirmaj).*

*Nun eĉ la sonĝo min ne plu portas  
al miaj liberaj jaroj.*

*Kaj ĉio, ĉio, ĉio*

*eĉ ensonĝe estas korto.*

*Korto, kie nun ronde vagas*

*mia kor' - najlita,*

*mia kor' - nuda,*

*mia kor' - krianta,*

*mia kor' kiu ensorbis*

*la grizon de la korto.*

*(Korto kie homoj*

*paŝas blinde,*

*senfine).*

*Originalo: 'Mi corazón es patio'*

*Tiu traduko aperis en Norda Prismo (1972 / 3)*

**Marcos Ana** estis 18-jara kiam niĝis la Hispana Civila Milito en 1939. Kiel junulo li batalis flanke de la agresita Respubliko kaj pro tio la venkinta reĝimo de Franco kondamnis lin al 22 jara enkarcerigo, en la malliberejo de Burgos. El tiu terura travivaĵo fontas ĉi tiu emociiga poemo.

Studotago *Esperanto kaj Ideologioj*

(Gent / Belgio - 20/10/2001)

Prelego de **Alberto Fernández** (Gent)

## La ideologia stumblo inter Socialismo kaj (la) Internacia Lingvo

Unue mi rakontos anekdoton.

Ĝus post la dua mondmilito, en 1947, - mi tiam estis 17-jara - mi hazarde malkovris Esperanton kaj tuj eklernis ĝin kun grandega fervoro. La ideo de Internacia Lingvo <sup>1</sup> estis por mi io grandioza. En tiu sama periodo mi fariĝis membro de la loka socialista junularmovado. Lun tagon mi renkontis unu el la naciaj gvidantoj de tiu movado. Li estis homo klera kun bona reputacio kaj li informis min pri baldaŭ okazonta *internacia* renkontiĝo de socialistaj gejunuloj. Mi tiam kun naiva entuziasmo diris: "Ho! Sed tio estos belega okazo por propagandi Esperanton!".

Kiel li reagis? Unue, li laŭte ridis. Poste, tre serioze li respondis: "*Esperanto estas io malbona!*"

Mi restis muta. Kvazaŭ fulmo min trafis. Kaj mi nenion komprenis: kiel povus lingvo por internacia komunikado, lingvo por plifaciligi kontaktojn inter la popoloj, lingvo kapabla klerigi la laboristan klason, lingvo por kontraŭbatali ŝovinismon - kiel tia lingvo en la kapo de serioza kaj kompetenta socialisto povus esti '*io malbona*'?

### ***Stranga nekompreno***

En la postaj jaroj, kiam mi iom post iom ekkonis la esperanto-movadon kaj ĉefe kiam mi iomete aktivis en la laborista esperanto-movado, mi ofte rememoris tiun anekdoton kaj mi konvinkiĝis, ke tiu homo estis verŝajne misinformita aŭ fuŝinformita de iuj esperantistaj zelotoj, aŭ ke li estis viktimo de antaŭjuĝoj. Aŭ eble li estis nur skeptika kaj konsideris Esperanton naiva utopiaĵo? Sed mi ankaŭ spertis, ke li ne estis sola inter

gvidantoj kaj respondeculoj en la loka kaj landa socialisma movado por montri malintereson kaj nekomprenon pri la laborista esperantismo. Tio povas aspekti strange ĉar ja ekzistas pluraj komunaj karakterizoj inter, unuflanke, la *baza* socialisma ideologio kaj, aliflanke, la principo de internacia lingvo kaj ties signifo por la laboristaj esperantistoj. Jen kelkaj ekzemploj de tiuj komunaj karakterizoj:

. unue, en ambaŭ vivas internaciismaj ideoj pri unueco de la laboristoj en la mondo

. due, socialismo estas ligita al scienca planado de la socio, kaj Esperanto, kiel konstruita lingvo, bone kongruas kun tiu koncepto

. trie, *komuna* internacia lingvo, kiel Esperanto, iel subfosas la nacian lojalecon, do la ŝovinismon kiu mem nutras militismon kaj kapitalismon - du malamikoj de socialismo

. kvare, la praktika uzo de Esperanto estas grava por la edukado de laboristoj, do, por ilia emancipado, kiun socialismo same alstrebas.

Konklude, la socialisma ideologio estas principe *tre akordigebla* kun la demokratia spirito de Esperanto. De kie venas tiu nekompreneo inter ambaŭ? Kio funde malglatas?

Ĉu kulpas la oftaj misprezentoj aŭ netaŭga informado el esperantista medio por tion klarigi? Aŭ la same oftaj antaŭjuĝoj kaj skeptikismo de la t.n. 'ekstera mondo'? Certe, ambaŭ faktoroj nekontesteble intervenas sed en tiu ĉi kazo multe pli gravas io alia, io principa - nome *mankas en la ĝenerala marksisma ideologio aproba sinteno rilate al Internacia Lingvo.*

<sup>2</sup> Per aliaj vortoj, la oficiala doktrino de la ĉefaj marksismaj teoriistoj estas neniel favora por la koncepto de Internacia Lingvo ĝenerale kaj ties konkreta formo en la lingvo Esperanto. Mi konfesas, ke nur antaŭ deko da jaroj mi tion eksciis kaj tiam komprenis la konsekvencojn.

Ni foje ekzameni tion tre koncize.

***lom kontraŭ, apenaŭ por***

Unue ni sciu ke, en la epoko de la t.n. 'utopia socialismo' la ideo de iu 'monda lingvo' aŭ 'universala lingvo' *tamen* apartenis al la nebulaj

konceptoj pri estonta socialisma socio. Unu el la tiutempaj plej influaj figuroj estis la politika filozofo kaj fama franca anarkiisto **Pierre Joseph Proudhon** (1809 - 1864) kiu eĉ iom fantaziis pri iu *langue universelle*. <sup>3</sup>

Samtempulo de Proudhon estis **Karl Marx** (1818 - 1883), la ĉefa fondinto de la 'scienca socialismo', la 'marksismo'. Marx estis ne sole filozofo sed ankaŭ radikala ekonomiisto kaj revolucia gvidanto, kun klaraj, funde ellaboritaj konceptoj pri la evoluo de la socio. Do, ni ne devas miri, ke li akre kritikis la utopiaĵojn de Proudhon kaj eĉ mokis liajn diletantajn klopodojn pri 'universala lingvo'. <sup>4</sup> En la ampleksa verkaro de Marx oni apenaŭ trovas iun mencion aŭ aludon pri dezirindeco de komuna internacia lingvo, eĉ ne kiel eventuala ligilo inter la laboristaj movadoj de diversaj landoj <sup>5</sup> kiuj, ekde 1864, klopodis internacie kunlabori en la *Internacia Laborista Asocio*, kiun historiistoj nun nomas '*Unua Internacio*' (ĉar poste venis ankaŭ *Dua*, *Tria* kaj *Kvara Internacio*).

Same kiel Proudhon, ankaŭ Marx vivis en epoko antaŭ la apero de praktike funkcia internacia lingvo, kiel Esperanto. Tio ne validas por la marksisme inspiritaj ideologoj, kiujn mi nun rapide prezentos.

**Lenin** (kaŝnomo de **Vladimir Iliĉ Uljanov**) (1870 - 1924), la fondinto de la Bolŝevika Partio, de Sovetunio kaj de la *Tria Internacio*, estis ne sole efika kaj sukcesa revolucia gvidanto sed ankaŭ grava kontribuanto al la socialisma teorio, la t.n. 'leninismo'. Kiel rilatis Lenin al la ideo de internacia lingvo ĝenerale, kaj al Esperanto speciale? Ekzistas onidiroj laŭ kiuj Lenin estis favora al la koncepto de internacia lingvo, eĉ ke li sciis Esperanton ... sed tio estas verŝajne pura fantazio. Oni fakte ne scias pri iu dokumento en kiu Lenin sin klare esprimas por aŭ kontraŭ la ideo de internacia lingvo. <sup>6</sup> Li, do, ne aktive interesis sin pri la problemo. Ni eĉ povas *dedukti*, ke li kontraŭis la ideon ĉar, kiam en 1918 la urbestro de Stokholmo lin demandis ĉu la sovetia registaro pretus aliĝi al internacia konvencio pri la enkonduko de mondlingvo en ĉiuj lernejoj (en tiu kazo temis pri Esperanto), Lenin lakone respondis "*Ni jam havas tri mondlingvojn, kaj la rusa estos la kvara!*". <sup>7</sup> La 'tri mondlingvoj' tiam estis la angla, franca kaj germana aŭ hispana.

Mi tamen devas insisti pri grava nocio en la idearo de Lenin, nome lia principo pri egalrajteco, lingve kaj kulture, de ĉiuj nacioj kaj popoloj en la

vastega Sovetunio. *Neniu privilegio por kiu ajn lingvo aŭ nacio.* <sup>8</sup> Tio estis politika koncepto kiu legitimis la ekziston de laborista, progresema esperanto-movado en la juna Sovetunio kaj kiu permesis ĝian rimarkindan kreskon en la 20-aj jaroj kaj komence de la 30-aj.

### ***Lingvo detruenda***

Post la morto de Lenin en 1924, la gvidadon de Sovetunio transprenis **Stalin** (kaŝnomo de **Jozef Djugaŝvili**) (1879 - 1953). Kiel ni scias, Stalin estis diktatora ŝtatestro de Sovetunio kaj ĉefa gvidanto de la monda komunismo dum preskaŭ 30 jaroj. Dum la jaroj 1937-38 laŭ ordono de Stalin okazis en Sovetunio la t.n. 'Granda Purigo', kun centmiloj, eble milionoj da viktimoj, depende de la fontoj. En tiu tragedio ankaŭ pereis preskaŭ la tuta Esperanto-movado.

Sed kial la esperantistoj estis eliminataj? La respondo, kompreneble, estas pli kompleksa kaj nuancita ol mi nun skizos. <sup>9</sup> La 'Granda Purigo' celis havigi al Stalin absolutan potencon super ĉiuj strukturoj de la ŝtato. Tio implicis, ke la Komunista Partio havu tre rigoran monopolon pri informado. Esperantistoj, per siaj multaj eksterlandaj kontaktoj, kapablis trarompi tiun informado-monopolon. Sekve, ili estis danĝeraj kaj tial devis malaperi. Sed alia faktoro estis aldona motivo por silentigi la esperanto-movadon en tiu epoko. Komence de la 30-aj jaroj estis ellaborita tre forta, centra ŝtatpotenco en Sovetunio, kun la rusa kiel oficiala lingvo por la tuta lando. Sekve, ne plu validis la principo de Lenin, ke en socialisma ŝtato ĉiuj ĝiaj lingvoj havu la samajn rajtojn. En tiu atmosfero de rusa ŝovinismo la ideologia bazo de la sovetia esperanto-movado fariĝis malkomforta kaj ĉiu agado por Esperanto suspekta. Sed ankaŭ la tradicia internaciismo de la sovetiaj esperantistoj subite fariĝis same suspektinda de post kiam, en tiu periodo, en Sovetunio estis definitive decidite *ne* eksporti la revolucion al aliaj landoj sed unue konstrui socialisman socion en Sovetunio mem.

Povas aspekti strange ke Stalin, en sia teoria kontribuo al marksismo, ankaŭ sin esprimis pri la lingva problemo en la estonta tutmonda socialisma socio. Ni povas jene resumi lian vidpunkton: <sup>10</sup>

. Antaŭ 1930, Stalin opiniis, ke en la epoko de komunismo la naciaj lingvoj *kunfandiĝos* en



unu komunan lingvon, do en 'ion novan'. Tio estis konforma al la tiam gvida lingvistika

skolo en Sovetunio - kaj relative favora por la ideo de konstruita internacia lingvo.

. En 1950 li estis pli imperiisme inspirita kaj deklaris ke, kiam du lingvoj kruciĝas, unu

rezultos kiel venkinto, konservas sian gramatikon kaj bazan leksikon (...) dum la alia lingvo

iom post iom formortas. En tiu koncepto kompreneble ne plu estas loko por la ideo de komuna internacia lingvo.

Tio pri Stalin. Nun sekvas du aliaj, tre influaj marksistoj.

### ***Intelektula malŝato***

Antaŭ la unua mondmilito la ĉefa teoriisto de la germana socialdemokratio estis **Karl Kautsky** (1854 - 1938). Li vaste popularigis la marksisman idearon sed samtempe tre skeptikis pri la bolŝevika revolucio en Sovetunio. Kautsky, kiel unua, metis la demandon de la mondlingvo en la marksisman teorion. <sup>11</sup> Li hazarde faris tion en 1887, t.e. en la jaro kiam Zamenhof publikigis sian projekton de *Internacia Lingvo*. Kion tiam Kautsky diris? Esence, li forlasis la ideon pri supernacia, universala lingvo - kiu ja estis heredaĵo de la utopia socialismo - kaj samtempe ekskludis la eblecon, ke lingva unueco kreiĝos per artefarita lingvo. Li plue opiniis, ke la malapero de malgrandaj lingvoj estas *neevitebla* rezulto de la ekonomia progreso. Fakte, tiu ortodoksa marksisma teorio de Kautsky montris malkomprenon pri la aspiroj de malgrandaj nacioj. Kautsky estis tre influhava kaj oni povas rigardi lian vidpunkton kiel la bazon de la esence negativa sinteno de marksistoj al la demando de neŭtrala internacia lingvo.

Tridek jarojn poste, en 1918, la italo **Antonio Gramsci** (1891 - 1938) reprenis la tezojn de Kautsky sed ĉi foje eksplicite kritikis kaj severe kondamnis Esperanton mem. <sup>12</sup> Gramsci estis vere originala kaj multflanka marksisma teoriisto kun internacia famo kaj unu el la fondintoj

de la Itala Komunista Partio. Li opiniis, ke 'serioza' marksisto ne interesiĝu pri Esperanto ĉar - mi iom krude resumas - Esperanto estas *antaŭtempa, netaŭga* kaj eĉ *nebezona*:

. *Antaŭtempa*, ĉar Esperanto rilatas al utopioj de la pasinteco kaj ĝi celas jam nun solvi la problemon de la multlingveco, kio fakte estas utopia salto al malproksima estonteco. *Netaŭga*, ĉar Esperanto estas plene artefarita, do 'mekanika', ne havas historian tradicion, nek literaturon, nek subtilan esprimovon kaj tial ĝi ne povas sukcesi

. *Nebezona*, ĉar Gramsci vidas en la estonteco iun ekzistantan lingvon kiel 'venkinta' sed en la nuntempo rifuzas atribui al Esperanto eĉ nur rolon helpan; *nebezona*, plie, ĉar - same kiel Kautsky - Gramsci neglektas la aspirojn de la malgrandaj nacioj kaj, inspirita de intelektula elitismo, eĉ opinias ke la subaj popoltavoloj ne tiom bezonas internaciajn kontaktojn ...

Ni povas resumi tiun rapidan superrigardon per la konstato ke la gvidaj marksismaj teoriistoj neniel favoris la ideon de iu 'antaŭtempa' Internacia Lingvo ĝenerale, ankaŭ ne de la 'nuntempa' artefarita Esperanto. Tiu baza negativa sinteno de la plej altaj marksismaj aŭtoritatoj kompreneble estis serioza handikapo por la disvastigo de Esperanto en laboristaj medioj. Tamen, en la mezaj tavoloj de la laborista movado tiu malaprobato rilate al Esperanto ne estis ĝenerala kaj, kiam ĝi manifestiĝis, ĝi ofte estis pli pragmata ol principa. Eĉ aŭdiĝis voĉoj favoraj, ankaŭ de renomaj gvidantoj. Mi mencias nur du ekzemplojn kie por-uloj kaj kontraŭ-uloj publike alfrontis unu la alian.

### ***Publika kontraŭstaro***

En 1907 okazis Internacia Socialista Kongreso en Stutgarto. <sup>13</sup> Du francaj socialistoj - unu el ili estis la fama oratoro Jean Jaurès - metis proponon en la tagordon, ke Esperanto estu uzata en la oficialaj dokumentoj de la Internacia Socialista Oficejo en Bruselo. Tiu relative modesta propono fiaskis, ĉefe pro tre akra kontraŭstaro de germana socialdemokrato. Cetere, tiu malakcepto estis malbone digestita far socialdemokratoj en la esperantista mondo kaj kelkaj el ili - inter kiuj la tiama esperanto-pioniro Edmond Privat - protestis per publika letero en kiu ili substrekis la kontraston inter la principa internaciismo de socialistoj

kaj ties reala konduto. <sup>14</sup> Vana protesto.

Dua ekzemplo, ankaŭ el 1907, rilatas al la unua Internacia Anarkiista Kongreso kiu tiam okazis en Amsterdamo. <sup>15</sup> Unu el la gvidaj partoprenantoj estis la belga anarkiista aktivulo **Emile Chapelier** (1870 - ...) . Chapelier estis samtempe agema esperantisto, i.a. kunlaboranto al la *Internacia Socia Revuo* kaj aŭtoro de pluraj studoj pri la rilato inter anarkiismo kaj la Internacia Lingvo. Por la kongreso Chapelier preparis detalan raporton pri la esenco, utilo kaj perspektivoj de Esperanto. Sed pro manovroj en la tagordo li ne rajtis prezenti tiun raporton. Krome, Chapelier, kune kun la itala anarkiista veterano Errico Malatesta, proponis al la Kongreso rezolucion ne sole por instigi la anarkiistojn, almenaŭ la plej aktivajn, lerni Esperanton sed ankaŭ por postuli ke la Anarkiista Internacio uzu Esperanton kiel laborlingvon. Tiu rezolucio estis malakceptita. La Kongreso montris sin pli pragmatisma ol idealisma kaj akceptis alian rezolucion kiu *“alvokas ĉiun kamaradon lerni almenaŭ unu vivantan lingvon”* .

Kaj tamen, malgraŭ la manko de ideologia subteno en la marksisma ideofluro, jam frue en la 20-a jarcento Esperanto hezite disvastiĝis en laboristaj rondoj. Kleraj, idealisme orientitaj homoj intuicie sentis, ke Internacia Lingvo estas neevitebla parto de estonta socialisma socio. Ili ankaŭ komprenis, ke praktika utiligo de Esperanto donos pli konkretan signifon al la internaciismaj pretendoj de la laborista movado. Por ili la alvoko *‘Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!’* estis ne vakua slogano, sed io vere alstrebinda.

### ***Internaciisma entuziasmo...***

La unuaj laboristaj esperanto-grupoj estis *tre* batalemaj. Sufiĉas, por tion konstati, ekzemple legi la programon de la *‘Internacia Asocio Paco-Libereco’* . Tiu estis la unua *proleta* internacia esperanto-asocio, fondita en 1906. Jen ĝia programo:

*. Lukti, per publikaĵoj, kontraŭ Armeo kaj Militarismo, Kapitalismo, Alkoholismo, kontraŭ*

dogmoj kaj antaŭjuĝoj kiuj malhelpas la plibonigon de la socia vivo

. Propagi la internacian lingvon Esperanto inter liberpensuloj, internaciistoj, socialistoj kaj anarkiistoj

. *Disvastigi inter esperantistoj la pensofluan de anti-militarismo, socialismo kaj anarkiismo.* [16](#)

Tiu revolucia fervoro fariĝis eĉ pli ambicia en 1910, kiam la sama asocio, sub la nova nomo 'Liberiga Stelo', jene adaptis sian programon:

'*lukti kontraŭ Alkoholismo*' fariĝis '*lukti kontraŭ Religio*' (kio cetere ne estas pli facile ...) kaj la modesta '*plibonigo de la socia vivo*' estis radikale ŝanĝita al '*renverso de la kapitalisma socio*'. [17](#)

Eble ni povas nuntempe moki la bataleman patoson de tiu programo, sed ĝi estis plene konforma al la ideofluo de la tiutempa laboristaro kiu plejparte vivis en mizeraj kondiĉoj.

... *kaj fundamentaj konceptoj*

Kiel ni vidas, la internacia lingvo Esperanto estis ĉi tie konsiderata kiel instrumento por atingi socialan idealon. Tio estas tre klare kaj sobre resumita en principo-deklaro de la Ĉeĥoslovaka '*Laborista Esperantista Asocio*'. En 1912 la revuo *Kulturo* de tiu asocio jene difinis ĝian ideologion:

. *Unue ni estas socialistoj, nur poste esperantistoj*

. *Nia ĉefa celo estas la praktika uzado de Esperanto je la servo de la internacia socialismo*

. *La kultura kaj politika sinteno de esperantisto ne povas esti malgrava afero, sed la vera esperantismo - kiel maturiĝinta ideo - devas esti parto de la pensmaniero de ĉiu progresema homo, antiklerikala, antinaciisma, antimilitarisma kaj socialisma*

. *Por ni, la Internacia Lingvo estas ilo por atingi niajn idealojn, ne celo.* [18](#)

Tiu principo-deklaro emfazas ion tre gravan, nome ke Internacia Lingvo estas esenca parto de progresema mondkoncepto, ke Internacia Lingvo ne povas sukcese disflori en kiu ajn mondo.

Ĉi tiuj konceptoj pri la rolo kaj signifo de la Internacia Lingvo burĝonis en diversaj variantoj en laboristaj grupoj antaŭ la unua mondmilito. Ili estis la idea fono por la kresko kaj disfloro, inter ambaŭ mondmilitoj, de forta laborista esperanto-movado, paralele kun la t.n. 'neŭtrala' movado. En tiu sama epoko SAT - Sennacieca Asocio Tutmonda - ne sole ĝuis sian apogeon sed ankaŭ transvivis akrajn ideologiajn konfliktojn inter siaj diversaj frakcioj, el kio rezultis skismaj internaciaj organizaĵoj de sinsekve anarkiistoj, komunistoj kaj socialistoj. Sed tiu ege interesa periodo ne apartenas al mia prelego, ankaŭ ne la tragikaj eventoj kiam la laborista esperantismo estis brutale subpremita en nazia Germanio aŭ silente sufokita en Sovetunio sub Stalin. Same ne estas parto de mia prelego la ideologia degenerado de la laborista esperantismo post la dua mondmilito kaj ĝia plejparta malapero.

### ***Du pensigaj ideoj***

El tiu tumulta epoko inter ambaŭ mondmilitoj mi tamen volas elstarigi du interesajn ideojn. Ili estos mia resuma konkludo.

La unua ideo estas eldiro de la franca verkisto kaj revoluciulo **Henri Barbusse** (1873 - 1935). En 1922 aperis la SAT-broŝuro *For la Neŭtralismon!*, verkita de Eugène Lanti - la fondinto de SAT - por pravigi la ekziston de *laborista* esperanto-movado, aparte de la 'neŭtrala' movado. Sur la titola paĝo de tiu broŝuro troviĝas jena citaĵo de Barbusse:

*“ La burĝaj kaj mondumaj esperantistoj estos pli kaj pli mirigataj kaj terurigataj de ĉio povanta eliri el tiu talismano: instrumento donanta al ĉiujn homojn la eblecon*

*interkompreniĝi”*. [19](#)

Barbusse ne estis esperantisto, nur simpatianto sed - se ni forgesas la bombastan tonon de liaj vortoj - li klare komprenis, ke la *plena, mondskala* utiligo de neŭtrala internacia lingvo havos tre profundajn konsekvencojn ne sole je nivelo internacia sed ankaŭ ene de la socio. Konsekvencoj pri kiuj ne-socie engaĝinta esperantisto apenaŭ estas konscia. Konsekvencoj kiuj rekte minacas konservativan mondbildon. Ĉu la nunmonde uzataj lingvoj ĝuos la samajn privilegiojn kiel nuntempe?

Ĉu ne malpliigoŝ ilia kultura kaj ekonomia premo super la cetera mondo? Krome, ŝovinismo kaj ekstrema naciismo, ĉu ili ne riskas perdi siajn plej krudajn formojn? Kaj, kiam pli vastaj tavoloj de la popolo disponos pri praktika internacia komunikilo, ĉu tio ne estos paŝo al plia demokratio? Ĉu ĝi ne erodos la kulturen elitismen de certa intelektularo? Ĉu ...? Sufiĉas: internacia lingvo, kiel Esperanto, neniel estas senkulpa hobia! Ĝi kapablas funde influi nian mondbildon. Tion, ekzemple, tre klare komprenis la nazioj kiam ili, en 1936, oficiale malpermesis Esperanton per la argumento ke “...*internacia miksita lingvo estas kontraŭa al la bazaj konceptoj de naziismo*”. [20](#)

Per aliaj vortoj: Internacia Lingvo estas ideologie *tre* ŝargita, en sia plejprofundo ĝi ne estas io neŭtrala! Ni tamen komprenu, ke tiu ideologia fono estas relativa kaj dependas de la rolo kiun oni al la Internacia Lingvo volas atribui, *kaj* en la nuntempo, *kaj* en la estonteco. Ju pli ambicia tiu rolo, des pli pezosa la ideologia flanko de la Internacia Lingvo kaj des pli da ideo kontraŭstaro ĝi renkontos de ekstere.

La dua interesa ideo kiun mi anoncis iel estas komplementa al la unua. Ĝin esprimis, komence de la 30-aj jaroj, la aŭstro **Franz Jonas** (1899 - 1974). Jonas estis tiam la ĉefa gvidanto de la bone organizitaj laboristaj esperantistoj en Aŭstrio. Krome, li havis fortan personecon, estis politike aktiva kaj post la dua mondmilito li fariĝis socialista urbestro de Vieno kaj poste, de 1965 ĝis 1974, eĉ prezidento de Aŭstrio. En 1933, kiam SAT trapasis ideologian krizon pro la foriro de la ortodoksaj komunistoj, Jonas opiniis ne plu senchava la ĉeeston de socialistoj ene de SAT kaj li decidis krei propran organizaĵon, nome ISE, t.e. *‘Internacio de Socialistaj Esperantistoj’*. Per tiu organizaĵo li esperis povi pli bone influi la *Duan Internacion* (de socialistoj) al subteno kaj utiligo de Esperanto. [21](#) Jen la kerno de lia rezonado:

*“Socialismo nepre bezonas Internacian Lingvon, ĉar socialismo estas nur internacie realigebla”*. [22](#)

La *konvinko*, ke socialismo estas nur internacie realigebla, laŭ mia opinio, estas funde prava, sed ĝi ne rekte koncernas nian temon. La *dedukto*, ke internacia socialismo *nepre* bezonas Internacian Lingvon estas tute logika, ĉar sen komuna Internacia Lingvo tia internacia ordo konservus kulturen diskriminacion, do ne-egalrajtajn popolojn, do ĝermojn de

Ŝovinismo - kaj tio ne plu estas socialismo. Internacia Lingvo estas esenca por alporti pli demokratitan bazon en internaciaj rilatoj. Cetere, kiu ajn progresema mondkoncepto kiu celas konstrui mondon pli justan por *ĉiuj*, estas apenaŭ realigebla se ĝi ne inkluzivas pozitivan aliron al la ideo kaj realigo de Internacia Lingvo. Ambaŭ konceptoj estas interligitaj. Ili sin reciproke bezonas

\* En tiu teksto foje aperas 'Internacia Lingvo' majuskle, foje 'internacia lingvo' minuskle. La majuskla formo implicas kaj emfazas, ke temas pri la *la ideo, koncepto aŭ principo de komuna, neŭtrala, konstruita internacia lingvo*.

## Notoj

La ĉi subaj indikoj montras la fonton de faktoj kaj citaĵoj en la prelego. Ekzemple, '(7) Lins (1990) p. 338' signifas, ke la fonto de (7) troviĝas en la paĝo 338 de la verko el 1990 de Lins, laŭ la 'konciza bibliografio'.

(1) Forster (1982) p. 188

(2) Lins (1990) p. 316-323

(3) Lins (1990) p. 320

(4) Ratkai (1978) p. 23

(5) Lins (1987) p. 38

(6) Podkaminer (1978) p. 38

(7) Lins (1990) p. 338

(8) Podkaminer (1978) p. 42

(9) Lins (1990) p. 383-403

(10) Lins (1990) p. 450 kaj Duc Goninaz (1993) p. 2

(11) Lins (1987) p. 38-39 kaj Lins (1990) p. 326

(12) Lins (1987) p. 34, 39 kaj Lins (1990) p. 332 kaj Blanke (1990) p. 536, 538

(13) Lins (1987) p. 32 kaj Lins (1990) p. 55

(14) de Bruin (1936) p. 30-31

(15) Moulaert (1995) p. 289, 295

(16) de Bruin (1936) p. 21



[\(17\)](#) de Bruin (1936) p. 22

[\(18\)](#) de Bruin (1936) p. 7-8

[\(19\)](#) Lanti (1922) frontpaço

[\(20\)](#) Lins (1990) p. 119

[\(21\)](#) Lins (1990) p. 276

[\(22\)](#) Borsboom (1976) p. 117

# Konciza bibliografio

Ĉi tiu bibliografio entenas nur la verkojn aŭ artikolojn el kiu la prelego ĉerpis faktojn kaj citaĵojn.

BLANKE, Detlev (red) (1978) - *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*, Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 228 p. (entenas dekon da studoj de ses diversaj aŭtoroj)

BLANKE, Detlev (1990) - *Lerni el la historio* (komentoj p. 532-543 en kaj pri la libro 'La danĝera lingvo' de U.Lins)

BORSBOOM, Eduard (1976) - *Vivo de Lanti*, Paris: SAT, 273p.

BRUIN, Gerrit Paulus de (1936) - *Laborista esperanta movado antaŭ la mondmilito*, Paris: SAT, 36 p. (temas evidente pri la unua mondmilito)

DUC GONINAZ, Michel (red) (1987) - *Studoj pri la Internacia Lingvo*, Gent: AIMAV 155 p. (naŭ diversaj aŭtoroj, Esperanto-Angla-Franca-Germana)

DUC GONINAZ, Michel (1993) - *La lecionoj de 'La danĝera lingvo'*, en 'Sennacieca Revuo' 1993, Paris: SAT

FORSTER, Peter G. (1982) - *The Esperanto Movement*, The Hague-Paris-New York: Mouton Publ. 14+413 p.

(speciale la ĉapitro 'Socialism and Esperanto')

LANTI, Eugène (1922) - *For la Neŭtralismon!*, dua eldono 1928, Paris: SAT, 32 p.

LINS, Ulrich (1987) - *Marxismus und Internationale Sprache*, en 'Studoj pri la Internacia Lingvo', (vidu ĉe Duc Goninaz 1987)

LINS, Ulrich (1990) - *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*, dua eldono, Moskvo: Progreso, 568 p.

MOULAERT, Jan (1995) - *Rood en Zwart. De anarchistische beweging in België 1880-1914.* (Ruĝa kaj Nigra - La anarkiista movado en Belgio 1880-1914), Leuven: Davidsfonds, 462 p.

PODKAMINER, Semjon N. (1978) - *Lenin kaj Esperanto* (en 'Socipolitikaj aspektoj ...' vidu ĉe Blanke 1978)

RATKAI, Arpad (1978) - *Socialismaj teorioj kaj la internacia laborista asocio pri la universala lingvo* (en 'Socipolitikaj aspektoj ... vidu ĉe Blanke 1978)

**Tiu-ĉi prelego aperis ankaŭ en jenaj publikaĵoj:**

*Internaciisto* (marto-aprilo 2002), *Sennacieca Revuo* (2003) kaj en la retpaĝoj de SATeH (SAT en Hispanio) [<http://www.nodo50.org/esperanto>]. Krome, ankaŭ aperis jenaj tradukoj: **angla** en *Weekly Worker*

(22.11.2001), **sveda** en *Arbetarhistoria* (1/2003), **hispana** en *SATeH-Dokumentoj* (número 1/es). Laŭinforme, same ekzistas tradukoj en la **japana** kaj **korea** sed mi ne povis tion kontroli.

# recenzo

## Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes (Westsachsen) Teil I und II.

Ino Kolbe (1914). Redaktita kaj komentita Detlev Blanke. Landesverband Sachsen des Deutschen Esperanto-Bundes e.V. Leipzig 1996. 64 + 11 + 135 + 26 p. , 21 cm.

Dum la 20-aj kaj 30-aj jaroj de la 20-a jarcento Esperanto entute ĝuis sian plej fortan ekspansion. Tio des pli validas por la laborista Esperanto-movado kiu tiam tre rapide kreskis, forte agitadis ... kaj interne ideologie batalis.

Tiu germanlingva verko nin mergas en tiun fascinan epokon, pli precize en la germanan urbon Leipzig [lajpcik] kaj ties regionon, unu el la ĉefaj centroj de la laborista esperantismo – sendube la plej vigla. Laŭ la intenco de la geaŭtoroj tiu libro ne estu konsiderata historia studo aŭ analizo, sed pli ekzakte *kontribuo*, baze de vasta dokumentaro, al iam verkota *plena* historio de la laborista Esperanto-movado en Germanio.

La prezentitaj dokumentoj vere imponas. Ilin pacience kolektis, post multjara esplora laboro, **Ino Kolbe**, filino de Reinhold Voigt, unu el la fondintoj de la Germana Laborista Esperanto-Ligo. Tiu historia materialo devenas el pluraj arĥivoj, jarkolektoj de lokaj laboristaj gazetoj, diversaj laboristaj Esperanto-revuoj kaj personaj rememoroj de iamaj aktivuloj. Ino Kolbe parte enkondukas la verkon kaj havigas bazajn tekstojn, **Detlev Blanke**, siaflanke, kohere ordigis la tuton, skizas historian fonon, sobre komentas la eventojn kaj abunde provizas la tuton per detalaj fontindikoj.

La *unua parto* jam aperis en 1991 kaj pritraktas la periodon de la komenco ĝis 1924. Ĝi unue dokumentas pri la estiĝo, en Leipzig, de la laborista Esperanto-societo 'Frateco' (1910) kaj pri iom surprizplena fondo, ankaŭ en Leipzig, de la Germana Laborista Esperanto-Ligo (1911). Ambaŭ revoluciemaj organizaĵoj estis malfide observataj far la policaj instancoj, pri kio atestas pluraj 'sekretaj' policaj raportoj. Post la unua mondmilito kaj la estiĝo de Sovetunio (1917) tiu revoluciemo

radikaliĝis: anarkiistoj, socialistoj kaj komunistoj pseŭdofrate klopodis kunlabori en la ĵusfondita Sennacieca Asocio Tutmonda (1921), en kiu i.a. la Leipzig-anoj **Otto Bässler** kaj **Walter Kampfrad**, ambaŭ komunistoj, poste ludos gravan rolon. Ekde tiu epoko du lokaj laboristaj gazetoj, la socialdemokrata *Leipziger Volkszeitung* (LVZ) kaj la komunista *Sächsische Arbeiter-Zeitung* (SAZ) tre ofte aperigis artikolojn kaj informojn pri la ekfloranta laborista Esperanto-movado.

Kiam en 1923 ĉiu porkomunista agado oficiale estis malpermesita, Otto Bässler kaj Walter Kampfrad lerte sukcesis eldoni, dum dek monatoj, la gazetaspektan revuon *Völkerspiegel* [spegulo de popoloj], kiun oni sendis al ĉiuj abonintoj de la tiam malpermesita SAZ. *Völkerspiegel* verŝajne estas unikaĵo en la historio de Esperanto: nacilingva revuo por ne-esperantista publiko, ekskluzive kun artikoloj tradukitaj el (engaĝintaj) Esperanto-revuoj kiel ekz-e *Sennacieca Revuo* kaj *Nova Epoko*, aŭ havigitaj pere de *Proletarischer Esperanto-Pressedienst* [proleta Esperanto gazetara servo], alia tre sukcesa iniciato de la Leipzig-a laborista grupo. *Völkerspiegel* evidente estis ege suspektinda al la oficialaj instancoj, kio legiĝas en deko da konfidencaj policaj raportoj, kun enhavo tikle instrua.

La *dua parto* redaktiĝis en 1996 kaj koncernas la periodon de 1925 al 1933, do ĝis la brutala malpermeso far la nazia reĝimo. Tiuj jaroj montras konsiderindan kreskon de la laborista Esperanto-movado entute, kio aparte vidiĝis en la streĉa, ofte publika aktiveco de la Leipzig-anoj. Ankaŭ pli kaj pli manifestiĝas iu ideologia disiĝo inter la socialdemokrata kaj komunista tendencoj ene de la grupoj. Sub influo de la eventoj en Sovetunio, de la tumulta politika situacio en Germanio ... kaj de la nova, utopiflara sennaciisma idearo en SAT, la ideologia antagonismo pliakriĝis kaj fine kondukis al aperta krizo, jam forte sentebla dum la 9-a SAT-kongreso en Leipzig (1929). Pri tiu kongreso la verko abunde prezentas tre detalajn, ĉiutagajn artikolojn el la rivalaj gazetoj LVZ (socialdemokrata) kaj SAZ (komunista). Leginda ekzemplo de kompara politika 'literaturo'! En 1930 okazas skismo en la Leipzig-a grupo: la socialdemokratoj eliĝas kaj fondas propran *socialistan* Esperanto-grupon, konsiderinte la ekzistantan *filio de Moskvo*. Sub impulso ĉefe de la Leipzig-anoj Otto Bässler kaj Walter Kampfrad aperas samjare la komunisme orientita revuo *Internaciisto* kiel alternativo al *Sennaciulo* de SAT kaj fondiĝas la sovetia-germana 'Eldon-Kooperativo de Revolucia

Esperanto-Literaturo' (EKRELO), vere eldon-fekunda entrepreno. La samaj Leipzig-anoj ludis kernan rolon en 1932 ĉe la fondo de la skisma 'Internacio de Proleta Esperantistaro' (IPE), opozicie al SAT.

En diversaj 'Aldonoj' plej okulfrapa estas longega listo de ĉiuj artikoloj, raportoj kaj sciigoj aperintaj en la lokaj gazetoj LVZ kaj SAZ ĝis 1932: atesto pri la tiutempa eksterordinara vikleco de la laborista Esperanto-movado.

Resume, verko kun riĉa materialo, sperte prezentita, kiu plurloke kompletigas aŭ nuancas jam ekzistantajn historiajn studojn pri la sama epoko kiel ekz-e *Historio de SAT 1921-1952*, *Historio pri la skismo en la laborista Esperanto-movado* (H. Platiel), *Vivo de Lanti* (E. Borsboom) kaj *La danĝera lingvo* (U. Lins).

El la UEA-revuo *Esperanto* (marto 2002).

### **Kiam du kanajloj intertraktas...**

Tuj post la komenco de la Hispana Civila Milito oni timis – ĉefe en okcidenta Eŭropo – ke tiu konflikto degeneros en iun duan mondmiliton. Laŭ iniciato de Francio kaj Britio estis starigita la tielnomata *Pakto de ne-interveno* kiu malpermesis liveri armilojn al ambaŭ konfliktantoj, ĉu al la laŭleĝa respubliko, ĉu al la ribelantaj faŝistoj. Tiun pakton subskribis ne nur Francio, Britio kaj aliaj okcidentaj demokratioj sed ankaŭ nazia Germanio, faŝisma Italio kaj Stalin-a Sovetio, ĉiu kun propraj motivoj kaj kaŝitaj intencoj. Tiu trompa 'Pakto' estis pli trua ol hermetika. Tiel, Sovetio liveris armilojn al la agresita *República* (temis ne pri malavara donaco sed pri varoj ore pagendaj!). Italio, siaflanke, tre abunde subtenis la ribelantajn *Nacionalistas* [Naciistoj] plejparte per peza armilaro kiel artilerio kaj tankoj sed ankaŭ per dekmiloj da militpretaj soldatoj. Germanio vidis belan okazon sin ekzerci por baldaŭaj agresoj kaj disponigis al Franco elitan aertrupon de sia *Luftwaffe*. Temis pri la fifama *Legio Kondoro* kies bomb- kaj ĉasaviadiloj ne sole tre efike intervenis super la diversaj batalejoj sed ankaŭ iniciatis la unuajn amasbombadojn en la historio dum kiuj plej suferis Madrido kaj la martira Guernica. Post la venko de Franco [Franko] tiu *Legio Kondoro* reflugis al Berlino kie ĝi estis pompe honorigita kaj gratulita far Hitler. Ĉi lasta ankaŭ varme gratulis la *Caudillo-n* pro ties glora venko. Franco lin respondis per

jena dankesprimo:

«*Je ricevo de viaj gratuloj kaj tiuj de la germana nacio okaze de la fina venko de niaj armeoj en Hispanio, bonvolu akcepti mian senton de estimo kaj dankemo, ankaŭ tiun de la hispana nacio, same kiel la amikecon de popolo kiu, en tre malfacilaj momentoj, malkovris kaj aprezis siajn verajn amikojn*».

Iom pli ol unu jaron poste Hitler konsideris la momenton oportuna por pesi la realan valoron de tiu amdeklaro. Li plenfide deziris renkonti Franco-n por diskuti komunan agadon. Sed li ne povis imagi, ke en tiu renkonto lin atendis surprizo neniel agrabla... Jen kiel tion priskribas W.L.Shirer en sia tre leginda historia verko pri la *Tria Regno*:

\*

Franco, la triumfinto de la Hispana Civila Milito dank'al la abunda helpo de nazia Germanio kaj faŝisma Italio, montris (kiel ĉiu diktatoro) nesatigeblan apetiton por la restaĵoj de la venkitoj, ĉefe se malmultekoste akireblaj. En junio 1940, kiam Francio frakasiĝis sub la *Blitzkrieg* de la nazia armeo, Franco haste proponis eniri la militon flanke de Germanio sed kondiĉe ke Hispanio akiru la preskaŭ tutan vastan teritorion en Afriko apartenantan al Francio, inkluzive de Maroko kaj eĉ aldone de abunda liverado de armiloj, benzino kaj nutraĵo.

Pasis kelkaj monatoj kaj tiam Hitler konsideris la momenton oportuna por ree marĉandi. Tiuintence li alvenis la 23-an de oktobro 1940 per sia speciala trajno en Hendaya, landlima urbo inter Hispanio kaj Francio, por tie renkonti *el Caudillo*. Sed *der Führer* tie travivos amarajn momentojn.

Multo ja okazis depost junio, se nur paroli pri la tre vigla rezisto de Britio. La ruza hispano neniel estis trompita per la blufado de lia vizitanto pri «la malvenko jam definitiva de Anglio». Same la Hitler-a propono donaci al Hispanio iujn «teritoriajn kompensojn» en Norda Afriko por tiel anstataŭi la perdon de francaj teritorioj «per akiro de britaj transmaraj teritorioj» tute ne plaĉis al Franco. Li postulis la plenan Francan Afrikon sen limigoj nek kondiĉoj. Jen la unua amara pilolo kiun Hitler devis engluti... Sed Hitler krome deziris ke Hispanio eniru la militon jam en januaro, do preskaŭ tuj. Franco rifuzis pretekstante la danĝeron de agado tiel subita.

Jen la dua pilolo... Sed Hitler pluis: Hispanio ja povus ataki *almenaŭ* Ĝibraltaron la 10-an de januaro al kio Germanio povus asisti dank'al sia *Luftwaffe* [aer-armeo] kun ties specialaj trupoj por surprizatakoj, kiel ili faris por fulme konkeri en majo 1940 la belgan fortikaĵon de Eben-Emael. Al kio la orgojla *Caudillo* seke respondis: «*Apartenas al la hispanoj solaj por rekonkeri Ĝibraltaron!*» Kaj jen la tria...

«La du diktatoroj tiel bataletis dum naŭ horoj» notis en sia taglibro la nemankenda interpretisto de Hitler, d-ro Schmidt, kiu aldonis «Dum Franco elverŝis parolfluson per voĉo kante monotona la ekscito de Hitler kreskis de minuto al minuto. Je la fino li piedfrape saltetis, kiel li foje same faris dum diskuto kun Chamberlain [Brita ĉefministro] kaj kolere kriis, ke pludiskuti estos senutila». «*Prefere oni al mi eltiraĉu kvar dentojn ol denove trasuferi tian diskuton*» li poste plende konfidis al Mussolini.

Post tiuj naŭ horoj sekvis vespermanĝo en tiucela vagono de la speciala trajno kaj tie finiĝis la diskutado sen iu ajn promeso de Franco deklari militon al Anglio. Ribbentrop [la germana ministro pri Eksterlando] sola daŭrigis la negocadon kun la responda ministro hispana, Serrano Suñer, por atingi, ke Hispanio subskribu almenaŭ engaĝon forpeli la anglojn el Ĝibraltaro kaj tiel fermi al ili la eniron de okcidenta Mediteraneo. Ankaŭ tiu germana klopodo estis vana.

«*Poltrono! Sendankulo!*» rabie voĉis Ribbentrop la postan tagon kaj aldonis «*Tiu senkuraĝulo kiu ĉion ŝuldas al ni nun rifuzas militi je nia flanko!*».

\*\*\*

Ĝis tie la verva priskribo de W.L.Shirer. Hitler gardis siajn kvar dentojn kaj Franco sian prudentan decidon ne eniri la duan mondmiliton. Almenaŭ ne rekte, ne oficiale ĉar kiam Germanio surprizatakis Sovetion Franco 'permesis' al 47000 falangistaj 'volontuloj' partopreni, en la germana armeo, al la ' batalo kontraŭ bolŝevismoj', en la *Blua Divizio*, sub komando de generalo Muñoz Grandes. Krome, dum la unuaj jaroj de la milito faŝisma Hispanio havigis al Germanio ŝirmejojn por ties submarŝipoj same kiel logistikan apogon kaj militan materialon. Sed tiaj minoraj pekoj estis postmilite indulge forgesitaj far la venkintaj Aliancanoj kiuj, dum la Malvarma Milito, konsideris ke faŝisma Hispanio ja estis



fortika bastiono antikomunisma, eĉ se multaj naziaj krimuloj tie ĝuis politikan protekton sub hispana suno. Rezulto: 40 jaroj da faŝisma diktaturo sub la sama suno.

## Fontoj

La dankvortoj de Franco al Hitler devenas el *Mourir à Madrid* [Morti en Madrido] de Frédéric de Rossif kaj Madeleine Chapal (Marabout Université 1963). Riĉe foto-ilustrita libro kun tre bela teksto, ofte emociiga. Bonega enkonduko al la ĉefaj historiaj eventoj de la hispana milito. La aŭtoroj ankaŭ produktis la samnoman dokumentan filmon.

La renkonto inter Hitler kaj Franco estas ero el *The Rise and Fall of the Third Reich* [Supreniro kaj falo de la Tria Regno] de William L. Shirer (Simon and Schuster New York 1960). La aŭtoro estis usona ĵurnalisto kiu, ekde la jaro 1920 observis en Berlino mem la estiĝon kaj venkon de naziismo. Post la dua mondmilito li rajtis konsulti grandegan amason da oficialaj nazi-dokumentoj el kio rezultis lia historia verko. Li ankaŭ abunde citas el privataj taglibroj de naziaj kaj faŝismaj altranguloj. Tre flua ĵurnalisma stilo. Verko leginda kaj releginda.

Ĉio cetera estas dise trovebla en *The Spanish Civil War* [La hispana civila milito] de Hugh Thomas (Penguin Books 1961 + ...). Monumenta verko, verŝajne la plej fidinda, pri la hispana civila milito. Abundaj fontindikoj kaj vasta bibliografio. Tre detala persono- kaj evento-indekso. Nemankenda konsultlibro.

El la interreta paĝaro de SATeH <http://www.nodo50.org/esperanto>

# Reago

## Parolas la leganto

*En novembro 1997 aperis en Heroldo de Esperanto konsterniga intervjuo de s-ro André Albault, tiam eksprezidanto de la Akademio de Esperanto. Liaj ideoj kaj konceptoj pri Esperanto kiel internacia lingvo estis tiom etmensaj kaj danĝeraj, ke mi indigne verkis ironian, eĉ acerban kritikon, kiun Heroldo plene publikigis en sia rubriko 'Parolas la leganto', sub la titolo **Albault malpravas** . Jen mia reago.*

\*\*\*

En la lasta parto de sia intervjuo en HdE (10 novembro 1997) s-ro André Albault pirotekнике ĵongladas per la literoj de nia alfabeto. Per la fundamento de la Fundamento.

Ke spite kriplan alfabeton Esperanto tamen sukcesis vivi kaj disflori dum 110 jaroj, tion ĝi certe dankas ne al sia rimarkinda lingva kohereco kaj subtila ekvilibro sed verŝajne al mirakla interveno de iu Sankta Lingvulo...

Ho, kompatindaj Hispanoj, nekapablaj distingi inter frikativo 'ĵ' kaj afrikato 'ĝ'! Sendube mi erare naskiĝis en Kastilio (provinco Leon) ĉar mi ilin senpene kaj klare kapablas prononci. Mi tuj aldonu ke, pro historiaj cirkonstancoj, dum miaj 7 unuaj vivojaroj mi parolis ekskluzive la hispanan lingvon (la 'kastilian'), poste dum unu jaro nur la francan, poste dum nova jaro nur la flandran: miaj junaj voĉkordoj komplezeme adaptiĝis al la respondaj fonologiaj labirintoj.

Ĉiu normale dotita infano, kie ajn en la mondo, se korekte instruita, voĉe samsuple kondutas. Certe, plenkreskulo povas sperti malfacilaĵojn (ĉiu etno siajn proprajn) lernante paroli alian idiomon, ankaŭ Esperanton. Sed ĉu pro tio ni fonologie dishaku nian *Lingvon Internacian* por iom komplezi al etno A kaj *ipso facto* lezi etnojn B, C, ...?

Amuze: s-ro André Albault, spertulo pri alfabetoj, laŭdas la 'klarvidon' de alia erudito, s-ano John Walter Young, sed tuj malsamopinias kun ties

*'bonai patri'* ! Demando de naiva laiko: Kion ja povus opinii tria fakulo pri la sama temo? Kaj kvara? Kaj ...? Ĉu akademiano André Albault vere nenion lernis el la Ido-skismo? Kaj el la aventura sorto de la multnombraj postaj lingvidoj, ĉiu pli perfekta ol la antaŭaj?

Ludi per la Esperanto-alfabeto estas same saĝe kiel ripari eksplodmekanisman de obuso en plena mallumo. La rezulto estos nek finvenkismo nek raŭmismo sed finveismo kaj traŭmatismo.

El *Heroldo* de 31 decembro 1997

*Bertolt Brecht*

# La tapiŝteksistoj el Kujan-Bulak honoras Leninon

*Ofte kaj malŝpare estis honorita la kamarado Lenin'.*

*Bustoj abundas kaj skulptaĵoj.*

*Urbojn laŭ li oni nomis kaj infanojn.*

*Okazis multlingvaj paroladoj,*

*kunvenoj kaj manifestacioj*

*de Ŝanhajo ĝis Ĉikago, honore al Lenin'.*

*Jene tamen honoris lin*

*la tapiŝteksistoj el Kujan-Bulak,*

*eta vilaĝo en suda Turkeŝtano:*

*Tie dudek tapiŝteksistoj vespere*

*la mizeran teksilon forlasas febrotreme.*

*Regadas febro: la stacidomon*

*plenigas la zumado de moskitoj kiuj densnube*

*leviĝas el la marĉo malantaŭ la kameltombejo.*

*Sed la fervojo kiu,*

*duonmonate akvon alportas kaj fumon,*

*iun tagon ankaŭ alportas la informon  
ke alproksimiĝas la tago por honori Leninon,  
kaj decidas la homoj el Kujan-Bulak,  
tapiŝteksistoj, povruloj,  
ke ankaŭ en ilia vilaĝeto  
gipsan buston oni metu, honore al Lenin'.  
Sed kiam kolektiĝas la mono por la busto,  
ĉiuj staras  
ŝanĉelaj pro febro kaj pagas  
ŝvebmane siajn kopekojn pene akiritajn.  
Kaj la Ruĝarmeano Stupa Gamalev,  
zorge kalkulante kaj bone observante,  
vidas la pretecon, honori Leninon, kaj ĝojas,  
sed ankaŭ li vidas la necertajn manojn.  
Kaj subite li proponas  
per la mono de la busto aĉeti petrolon kaj  
tiun disverŝi sur la marĉon malantaŭ la kameltombejo  
el kiu la moskitoj venas kiuj  
la febron estigas.  
Tiel oni luktas kontraŭ la febron en Kujan-Bulak, ĝuste  
pro honoro al la mortinta, sed*

*neforgesebla*

*kamarado Lenin'.*

*Tion ili decidis. La tagon de l'honorado ili  
siajn kadukajn sitelojn, plenajn je nigra petrol', elportis  
kaj, unu post la alia,  
la marçon per ĝi surverŝis.*

*Tiel ili utilis al si mem, honorante Leninon, kaj  
pruvis ke ili ĝuste komprenis lin.*

*\**

*Ni sciiĝis kiel la homoj el Kujan-Bulak  
Leninon honoris. Kiam nun vespere  
la petrolo estis aĉetita kaj disverŝita super la março,  
viro ekstaris en la kunveno kaj postulis  
ke oni metu tabulon ĉe la stacidomo  
kun la informo pri l'okazintaĵo, ankaŭ entenantan  
la ŝanĝitan planon kaj la anstataŭigon de la  
Lenin-busto kontraŭ la febrodetrua petrolo.  
Kaj tio ĉi honore al Lenin'.  
Kaj tion ankaŭ ili faris  
kaj la tabulon metis.*

*Originalo: 'Die Teppichweber von Kujan-Bulak ehren Lenin'*

*Tiu traduko aperis en **der esperantist** (januaro 1968) kaj en **Sennacieca Revuo** (1968)*

# Kolofono

Titolo: Kalejdoskopa rememoro

Aŭtoro: Alberto Fernández

Kovrilo: Julia Litvinova

ISBN de la papera versio: 978 90 77066 33 1

UDK: 82.3.892

NUR: 325

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - 2060 Antverpeno

[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be)

© 2007 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi ekzemplero de "Kalejdoskopa rememoro" estas nekompleta provlibro kaj rajtas est kopiata kaj pludonata.